

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Esperanto-kongreso
en la lando de lumaj
matenoj

Novaj gvidantoj de UEA

La kongresa sezono:
junulara, eŭropa, SATa,
brazila, hispana, ĉilia,
usona, norvega, skota,
senprograma, balta,
familia, artaluma...

Nerezignebla renovigo
bezonatas por UEA

Originala novelo de
Leif Nordenstorm

La Mastro de l' Ringoj
finfine reaperis

Kvar recenzoj



Septembro
2007

Nº 8-9



Ĉinio. Fine de junio en Kantono finiĝis du Esperanto-kursoj. En la universitato instruis Liu Weizhuang kaj Augusto Casquero, kaj tie oni disdonis diplomojn al la studentoj. En la sidejo de la Esperanto-Asocio de Kantono instruis Augusto Casquero. (Augusto Casquero)



Ĉeĥio-Germanio. La bela valo de Elbo/Labo, ĉirkaŭita de pitoreskaj rokoj de la Saksa Svisujo, liveris la kadron por pikniko kaj babilado 30 jun 2007 ĉe la kilometro “nulo” — sur la limlinio por 25 Esperanto-amikoj. Duono de la programo okazis en Ĉeĥio, kaj la alia duono en Germanio. (Hans-Joachim Gunkel / Siegfried Linke)



Brazilo. 5 aŭg 2007 en Rio-de-Ĵaneiro la atleta Walter Fontes partoprenis en la 20a Mararmea Stratkurado kunportante la Esperantan flagon. Laŭ la stratkuristo, tio estis konsekvenco de debatoj kadre de la ronda tablo *Esperanto en Sportoj* en la 42a Brazila Kongreso de Esperanto. (Fabiano Henrique)

Sur la kovrilo: Timo Väänänen ellaboris la elektran kanteilon, kaj en la festivalo *Arta Lumo* li ludis ĝin kunlabore kun dancistino Päivi Järvinen. (Fotis Ilari Ikävalko)

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO 2007. №8-9 (154-155)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2007

Internacia tarifo: 32 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 18 eŭroj

Ruslanda tarifo: 390 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la paĝo 23 de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 700 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2007.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2007, №8-9 (154-155).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 22 августа 2007 г.

Цена свободная. Тираж: 700 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

En la lando de lumaj matenoj

**92a Universala Kongreso de Esperanto
Jokohamo. 4–11 aŭg 2007**

Kongresi en Japanio, finfine, eblas diri, se konsideri la grandan nombron de japanaj esperantistoj kaj la gravan financon subtenon kiun japanoj donas al la Esperanto-movado. De la pasinta fojo en Tokio (1965) pasis jam 42 jaroj. Kial ne kongresi pli frue? Eble timigis la onidire altaj prezoj en Japanio. Tamen mi ne uzis pli da mono por ĉiutagaj aĉetoj ol en Italio pasintjare. En vendejoj eblis aĉeti suŝion kaj aliajn pretajn manĝaĵojn, nur la manko de kono de japanaj specialaĵoj limigis la elekteblon. Kaj en la kongreseja manĝejo eblis manĝi bone per mil enoj (6,25 eŭroj). Nu, helpis ankaŭ favora kurzo ĝuste dum la kongreso kaj antaŭ ĝi.

En la kongreso estis multe da japanoj. Se kalkuli ankaŭ la dumkongresajn aliĝojn ili nombris entute 1018 el precize 1900 kongresanoj. Onidire, kelkaj japanoj aligis siajn konatojn por atingi pli grandan nombron.

Japanoj vivas longe. La unua indiko pri tio estis en la inaŭguro kiam Kurisu Kei, 97-jara, parolis: li forte pledis por aĉeto de esperantaj libroj kaj menciis kiel ekzemplon la libron *Resurekto* de Lev Tolstoj: se esperantistoj pli aĉetus librojn, aperus pli da tradukoj. Alia ekzemplo pri maljuna japano aperis ĉe IKU-prelego de José Vergara, kiu ĝuste temis pri vivodaŭro kaj ĝiaj sociaj determinoj: laŭ Vergara gravas socia egaleco.

Japanio prezentas por eŭropano nekutiman mondon. Unuflanke Japanio ja estas absolute moderna socio, kie ĉio funkcias. Aliflanke kelkaj praktikoj estas tute malsamaj ol en niaj kutimaj socioj: en restoracioj oni ne pagas ĉe la tablo al kelner sed ĉe la elirejo; ankaŭ lingvaj praktikoj malsamas: mi tute ne aŭdis vorton “sajonara” (ĝis revido), sed la vorto “haj” (jes) estas uzata multe pli ofte ol en ajna eŭropa lingvo. Kaj la manĝoj: tute alispecaj ol la kutimaj eŭropaj. Krome Japanio havas strangan lokon en monda temposistemo. Ĝi situas +7 horojn antaŭ la somera mez-eŭropa tempo, sed Vladivostok kiu situas okcidente, fakte havas somere horloĝon kun du horoj antaŭ la japana tempo. Sekve en Japanio matenoj estas lumaj, sed vespere mallumiĝas frue.

Japanio estas ankaŭ stranga lingva mondo. Maksimume 2-3 procentoj el japanoj kapablas paroli angle pli ol nur

kelkajn frazojn aŭ unuopajn vortojn. Eĉ iometa kono de la japana helpas multe, sed por elementaj lernantoj tio signifas konon de la parola lingvo, dum lerni la skribadon per tri alfabetoj bezonus pli da tempo. Ankaŭ latinlitere (la kvara alfabeto!) skribitaj tekstoj en la japana videblis fojfoje. Ekzemple la nomoj de stacidomoj estis ofte en du aŭ tri diversaj skriboj.

Tamen la anglaj tekstoj kaj prospektoj mankis en pluraj turismaj lokoj, sed same mankis la ne-japanaj turistoj. Dum ekskursoj apud Esperanta grupo tute ne aperis aliaj eksterlandanoj. Kial do servi ne-ekzistantajn eksterlandanojn per anglalingvaj tekstoj? Tie, kie anglalingvaj tekstoj aperis, estis ofte ankaŭ informoj en la ĉina kaj la korea lingvoj.

Ĉiuj, kun kiuj mi parolis pri la populareco de fremdaj lingvoj en Japanio apud la angla, diris ke inter japanoj, kaj aparte inter junularo, kreskas intereso al la ĉina kaj korea lingvoj, ĉar junularo multe vojaĝas en tiuj landoj. Krome japana kulturo kaj japana lingvo furoras eksterlande, pri kio ni aŭdis prelegon de pola esperantisto, kiu eldonas japanajn bildstriojn en sia lando. La samo validas ankaŭ en Finnlando.

Jen la kongresa temo: *Okcidento en oriento: akcepto kaj rezisto*. Tamen laŭ diskutoj pri la temo pli ĝuste temas pri *Okcidento super oriento: akcepto vole-nevole*.

La eliranta prezidanto Renato Corsetti malfermis la kongreson, sed ne per planita parolo kiun li estis verkinta multe pli frue, sed li simple ne kapablis resti en la teksto, kiam li vidis la publikon. Do, anstataŭ falsaj profetoj li parolis pri la ponta rolo de Esperanto en rilatoj inter ne-eŭropanoj kaj eŭrop-

anoj. Esperanto devas komenci ludi rolon en tiu ĉi kampo, do inter ĉiuj civilizacioj de la mondo. Tiel Esperanto respondos al la bezonoj de la mondo. En la mondo oni ne povas elekti kion akcepti kaj kion ne: la kulturoj estas devigataj akcepti la mondan ordon tia kiel ĝin difinis la regantoj de tiu ordo. Esperanto donas eblecon decidi, kion elekti el mondaj kulturoj.

En “Centra Oficejo respondas” aperis nenia kritika demando. Krome al la kongresa sekretario ne venis eĉ unu demando, kio laŭ Osmo Buller indikis, ke ĉiuj estas kontentaj.

Tamen ne mankis problemetoj. La haveblo de kongresaj poŝtkartoj estis neeblo por multaj kongresanoj. Ili venas pli ne antaŭvidite ol pluvoj, diris la libroservisto Ionel Oneț al mia demando. Eblas prognozi la venon de pluvoj, sed ne eblas antaŭdiri, kiam venos novaj poŝtkartoj. Dum kelkaj tagoj estis iom da espero ke ili eble venos fine de la semajno, tamen poste la respondo estis pli klara: ili tute ne venos.

Krome laŭdire (mi mem ne ĉeestis) elĉerpiĝis manĝaĵoj dum la bankedo: la organizantoj pretigis manĝojn laŭ japanaj mezuroj, sed la partoprenantoj prenis ilin el memserva tablo en okcidentaj kvantoj. Se juĝi laŭ kvanto de manĝaĵoj en urbestra akcepto, eblis nur gustumeti la specialaĵojn, ne eĉ manĝeti. Ankaŭ varmego, ofte pli ol +30 gradoj kaj humideco, apartenas al problemoj, aparte por nordanoj. La kongresejo feliĉe situis nur je duminuta distanco el mia hotelo, sed pli malproksimaj kongresejoj, kie okazis teatraĵoj kaj koncertoj, restis tro foraj por mi, eble ankaŭ por aliaj kongresanoj, kiuj loĝis proksime al la ĉefa kongresejo.

La kongreso rezultigis ankaŭ novan prezidanton de UEA, Probal Daşgupta, kiu parolas tre filozofieme kaj kies eldiroj postulas pli grandan kulturen klercon ol ofte klaraj kaj senproblemaj eldiroj de la antaŭa prezidanto.

Jukka Pietiläinen

Jokohamo. Muzika paŭzo en la Solena Malfermo (Foto el la kongresa retejo)



La komitato uzis sian potencon en elekto de la estraro

La komitato de UEA jam komence de la kunsido en Jokohamo havis pli bonan kvorumon ol neniam ajn en Eŭropo, konstatis ĝenerala direktoro Osmo Buller post la kontrolo de ĉeestantoj. El 57 nomumitaj komitataj ĉeestis 46. La ĉi-jara kunsido de komitato montris pli grandan volon de la komitato influi al la elekto kaj ne nur akcepti la elektokomisionan proponon, kiel okazis antaŭ tri jaroj en Pekino. En la aero dekomence ŝvebis ideo elekti nur sep kaj ne ok estraranojn.

Unue, tamen, estis elekto de komitatanoj C. Jam tiam la propono de la elektokomisiono komencis kolapsi: per eta plimulto de 20 kontraŭ 19 (4 sindetenoj) la komitato decidis uzi voĉdonilon, kie ne aperis rekomendo de elektokomisiono por ses kandidatoj (entute la komitato decidis elekti 10 C-komitatanojn el 14 kandidatoj), sed kie ĉiuj kandidatoj aperis en alfabeto ordo sen rekomendoj. Tamen ĉiuj rekomenditoj (kandidatoj por la estraro kaj komitataj reviziantoj) estis elektitaj. En tiu elekto unu el la membroj de elektokomisiono, Edwige Tantin Ackermann, ricevis nur 14 voĉojn, kio indikis la malkontenton de la komitato al elektoproceduro en Pekino. Ŝi ankaŭ insistis, ke la komitatanoj uzu voĉdonilojn kun rekomendoj.

La elekto de la estraro kaŭzis multe da diskuto, ĉu elekti nur inter la ok



rekomenditaj kandidatoj, aŭ konsideri ankaŭ la aliajn tri kandidatojn (Yves Bellefeuille, Maritza Gutiérrez kaj Amri Wandel). Per klara plimulto (40-5, 3 sindetenoj) la komitato decidis elekti nur sep estraranojn (la klara celo estis ne elekti Marija Belošević, kiu antaŭ la kongreso estis forte kritikata de la kroata landa asocio). Per malpli granda plimulto (25-15, 7 sindetenoj) la komitato decidis elekti du vicprezidantojn. Malgraŭ diskuto kaj subteno por egalrajteco de ĉiuj laŭregule nomumitaj kandidatoj, la komitato ne voĉdonis ĉu uzi la voĉdonilon kiu enhavis nur rekomenditajn kandidatojn aŭ uzi voĉdonilon kun ĉiuj kandidatoj. Malklaris, ĉu tia propono estis klare farita. Krome, la ĝenerala direktoro havis nur unu specon de voĉdonilo je sia dispono (nur kun rekomenditaj kandidatoj).

La komitato uzis grandan parton el sia unua kunsido por diskuti pri la elektoj, tiel ke la voĉdono pri la estraro okazis en sabato, sed la rezulto estis publikigita nur en lunda kunsido. La

nova estraro konsistas el prezidanto **Probal Daşgupta** (Hindio), vicprezidantoj **Ranieri Clerici** (Italio) kaj **Claude Nourmont** (Luksemburgio), ĝenerala sekretario **Barbara Pietrzak** (Pollando), kaj el tri estraranoj **Loes Demmendaal** (Nederlando), **Hori Yasuo** (Japanio) kaj **José Vergara** (Ĉilio). La geografia disvastiĝo de la nova estraro estas preskaŭ la sama kiel tiu de la antaŭa estraro. Tamen nun ankaŭ orienta parto de Meza Eŭropo estas reprezentita.

Eventuale tiuj, kiuj proponis la elekton de nur unu vicprezidanto celis al la ebleco havi pli da kandidatoj post kiam ne estus elektitaj sep, sed nur ses estraranoj inter kandidatoj rekomenditaj de la elektokomisiono. Inter alie Michela Lipari, kiu forte subtenis la kandidatecon de Maritza Gutiérrez (kiu kandidatis por daŭrigi en la estraro sed ne estis rekomendita), forte pledis por nur unu vicprezidanto.

Ĉar la komitato uzis sian tempon por diskuti pri la elektoj, ne restis tempo por pluraj aliaj diskutoj. Inter alie ne estis tempo por diskuti pri la rezolucio. La diskuto tamen okazis, sed post la voĉdonado. Ne plu havis sencon diskuti, sed iuj ja volis klarigi sian kontraŭan aŭ sindetenan voĉon.

Inter la gravaj decidoj estis ankaŭ, ke Konisi Gaku (Japanio) kaj Endre Dudich (Hungario) estis elektitaj honoraj membroj, kaj ke Asocio de esperantistoj de Taĝikio estis akceptita kiel nova landa asocio de UEA.

Jukka Pietiläinen

Rezolucio de la 92a Universala Kongreso de Esperanto

La 92a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Jokohamo (Japanio) kun 1900 partoprenantoj el 57 landoj kun la temo "Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto",

Konstatinte, ke ideoj kaj influoj moviĝas ambaŭdirekte inter "Okcidento" kaj "Oriento", sed ke pro la aktualaj neegalecoj tiu reciprokeco iĝis nevidebla,

Konstatinte, ke tiu sama kaŭzo malhelpas ankaŭ la fluon de ideoj kaj influoj inter aziaj landoj,

Notinte, ke tro rigidaj konceptoj pri "Okcidento" kaj "Oriento" malhelpas interlokajn dialogojn, kaj

Notinte kun kontento, ke la 2008a jaro estas proklamita fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kiel Internacia Jaro de Lingvoj,

Rekomendas, ke la rilatoj inter civilizoj kaj kulturoj baziĝu ne sur konflikto sed sur interkompreniĝo, justeco kaj paco,

Konfirmas la potencialon de Esperanto por interponti homojn de diversaj lingvoj kaj kulturoj,

Atentigas samtempe pri la akuta neceso konsciiĝi pri interkulturaj problemoj en kaj ekster la Esperanto-komunumo, kaj rilati kun instancoj kaj asocioj kiuj jam okupiĝas pri tiaj problemoj,

Deklaras, ke la ekesto de regiona kunlaboro ankaŭ en Azio kaj aliaj mondopartoj estas esenca antaŭkondiĉo por la plua disvolviĝo de Esperantaj agadoj tie,

Esprimas la senkondiĉan subtenon de la Esperanto-komunumo al vera plurlingvismo kiel rimedo por akceli unuecon en diverseco, kaj kuraĝigas esperantistojn energie labori por la plenumo de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj por la Internacia Jaro de Lingvoj.

UK-94: post du jaroj en Bjalistoko!

La nova estraro de UEA decidis en sia kunsido 9 aŭg 2007 en Jokohamo, ke la 94a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Bjalistoko (Pollando) por omaĝi la 150an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L.L. Zamenhof en lia naskiĝurbo mem.

La urbestro de Bjalistoko, d-ro Tadeusz Truskolaski ĉeestis la kunsidon, kune kun la prezidantino de Bjalistoka Esperanto-Societo, Elżbieta Karczewska, kaj Aleksander Zdechlik, kiu reprezentis la Ĉefan Estraron de Pola Esperanto-Asocio. D-ro Truskolaski transdonis al la Estraro alvokon de bjalistokanoj por okazigo de la UK en ilia urbo. Dum unu semajno ĉ. 3500 personoj subskribis la alvokon. Krom entuziasman akcepton de la urbanoj, la urbestro promesis vastan apogon de la urbo al la organizado de la kongreso.

GK UEA

Sukcesa kaj bonega IJK-63

Post sep jaroj (Hong Kong en 2000), IJK — Internacia Junulara Kongreso de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) — ĉi-jare okazis denove en Sudorienta Azio.

Inter 28 jul kaj 3 aŭg la kongreson gastigis Hanojo, la ĉefurbo de Vjetnamujo. Same kiel mirakle resaniĝis la lando post teruraj militaj okazaĵoj en la pasinta jarcento, reviviĝis ankaŭ la Esperanto-movado en tiu lando, kies junulara organizo, VEJO, antaŭ du jaroj estis akceptita kiel la 44a landa sekcio de TEJO. Kaj ili montriĝis tre bonaj kaj afablaj gastigantoj.

Post plurmonataj kursoj en la universitato de fremdaj lingvoj, loka kongresa komitato sukcesis ekhavi kelkdekan armeon de junaj, laboremaj kaj amikemaj helpantoj, kiuj simple ne povis lasi eventualaĵojn. Ili prizorgis ĉies peton, demandon aŭ plendon, tiel ke neniu kongresano restis malkontenta.

La kongresanoj (ĉ. 200) povis konatiĝi kun historio de Vjetnamujo kaj pri la kulturo, muziko, danco kaj kuirarto, sed same pri multaj aliaj temoj. Unu el plej interesaj kongresaj tagoj estis Internacia tago, dum kiu la partoprenantoj mem kontribuis per prelegoj kaj diskutoj pri siaj landoj kaj en kiu okazis internacia festivalo — foira prezentado de lingvoj, landoj, manĝaĵoj kaj aliaj interesaĵoj el la tuta mondo.

Rilate al la ĉeftemo, estis organizitaj kelkaj prelegoj kaj diskutrondoj, inter kiuj plej interesa estis prezento “Vjetnamio survoje al renoviĝo” dum kiu oni povis aŭdi multon pri laŭdinda sukceso de la vjetnama popolo.

TEJO-komitato ne sukcesis kunveni en kvoruma kvanto, kaj tial ne okazis elektoj de nova estraro aŭ iu ajn decido.

Sed kunsidis reprezentantoj de Aziaj landoj. Ankaŭ okazis kunveno de Vjetnama Esperantista Junulara Organizo, en kiu elektiĝis nova estraro.

La ekskursiva programo estis abunda kaj plaĉa. Krom vizitoj al la urbaj vidindaĵoj (maŭzoleo de Ho Chi Min, pagodoj kaj lagoj), okazis tuttaga vojaĝo al Ha Long golfo, kiun UNESCO enskribis en la liston de mondaj heredaĵoj pro ĝia unika kaj elstara aspekto. Tie troviĝas miloj da diversgrandaj insuloj kun interesaj formoj, grotoj kaj naĝejoj.

La kongreso akiris grandan atenton de loka gazetaro. Verŝajne unu el kialoj estis fakto ke kongresanoj venis el pli ol 30 landoj, kaj tio kolorigis la semajnon tutmonde kaj allogis.

Resume, la kongreso en Vjetnamujo estis bonvena ŝanĝo post kelkaj eŭropaj kongresoj, kun iom malsama malneto sed tre bona etoso, kun ege diligenta kaj kapabla organiza teamo, sen grandaj problemoj aŭ maltrafaĵoj, kun ebleco por Esperantistoj el foraj landoj (aparte el Azio, Afriko kaj Aŭstralio) unuafoje veni al IJK kaj interkonatiĝi. Almenaŭ tial mi kredas ke ĉiuj partoprenintoj taksos ĝin kiel sukcesa kaj bonega.

Kompreneble, en ĉi tiu artikolo ne eblas transpreni ĉiujn detalojn de la kongresa semajno, kiel sonon de tradiciaj kantoj, ridetojn de gehelpantoj, gustojn de manĝaĵoj, humidecon kaj varmecon, malmolecon de senmatracaj litoj, trafik-funkciadon, abundecon de urba bazon aŭ vesper-programan etoson. Tiajn detalojn eblas nur travivi kaj mem sperti, kaj konvinkiĝi ke Internacia Junulara Kongreso de TEJO estas unu el plej ĝojplenaj kaj amuzaj eventoj en Esperanto-mondo.

Haris Subašić

SOMERE-5: Eta sed internacia

Entute 33 homoj el ses landoj partoprenis en la 5a SOMERE, kiu okazis 13–28 jul en arbara domo apud la urbo Jünkerath sude de Kolonjo en Germanio, same kiel pasintjare. Pro la proksimeco al Belgio, Nederlando kaj Francio ankaŭ ĉi-foje la plimulto de la partoprenantoj, sume 18 homoj, alveturis el eksterlando. Kunvenis homoj inter ok kaj okdeko da jaroj, kio kreis denove buntan gamon da interesoj kaj kontribuoj.

Pro la granda kvanto da flue parolantaj eksterlandanoj la kutima lingvo dum SOMERE estas Esperanto — idealo grundo ne nur por Esperanto-parolantoj, kiuj volas ĝui internacian etoson, sed ankaŭ por komencantoj kaj progresantoj, kiujn ĉirkaŭas nia lingvo. Ankaŭ ĉi-foje alvenis pluraj homoj, kiuj komence heziteme elbuŝigis frazetojn, dum fine la komunikado funkciis multe pli glate. Al tio kontribuis la konversacia rondo, kiun gvidis unue Mauro Tauzzi kaj poste Henny De Ketelaere. Sed, kompreneble, ankaŭ la fluparolantoj trovis ion por lerni kaj ekzemple orientiĝis pri vakcinioj, mirteloj kaj grosoj (kaj frande pri arbaraj framboj kaj fragoj), dum oni devis forigi iksodon.

26 jul okazis festeto por memori la 120an datrevenon de la naskiĝo de Esperanto. Post tostado, laŭlegado el la *Unua Libro* kaj kukoĝuado ni diskutis pri la ĝisnuna historio de Esperanto kaj ĝiaj perspektivoj.

En la programo troviĝis prelego kaj ekzercoj pri “senperforta komunikado” de Danko Leyk kaj prelegoj pri Goludo kaj pri primaj nombroj de Ulrich Görtz. Ludger Schmeink prezentis organan koncerton de Dietrich Bütchde kaj de kelkaj samtempuloj. Ni elĉerpis nin dum tri futbalaj matĉoj. Okazis malstreĉiĝo laŭ Chi Gong kaj laŭ Tai Chi sub gvido de Jutta Chikato, “Olimpikaj Ludoj” en la impona ludsalono de la domo, dancateliero kaj cirklodancoj. Vespere ni kelkfoje bivakfajrumis kaj uzis multan tempon por ferietosa babilado.

Inter la ekskursoj elstaris serio de promenaj serĉadoj kadre de “geokaŝado” (helpe de la GPS-orientiĝo), kiujn gvidis Julika Rosenstock. Krome ni vizitis muzeon de muskaptiloj, la urbon Akeno kun ties katedralo, diversajn urbetojn en la ĉirkaŭaĵo kaj lagon por baniĝi. Kaj, certe, ni promenis en la ĉirkaŭa arbaro.

Lu Wunsch-Rolshoven



Gajaj IJKanoj en Hanojo (Fotis Haris Subašić)



SAT: Pri solidareco en Parizo

Laŭ multaj partoprenintoj, la 80a Kongreso de Sennaciisma Asocio Tutmonda (SAT) estis la plej lerte organizita kaj enhavoriĉa SAT-kongreso, kiun ili ĝis nun spertis. Eble ne mirige, konsiderante la relativan membroforton de SAT en kaj ĉirkaŭ Parizo. En Antony, 12 km sude de Parizo, kongresis ĉirkaŭ 140 SAT-membroj kaj -nemembroj inter 21 kaj 28 jul 2007.

Kiel konvenas al asocio aspiranta maksimuman bazdemokratiecon, ĝeneralaj laborkunsidoj okupis multe da tempo. Oni traktis i.a. pliampleksigon de la redaktoskipo de *Sennaciulo*, starigon de plurpersona financa kontrolkomisiono, revigligon de SAT-rondoj en diversaj mondopartoj, starigon de skipo por esplori eblan KD-version de PIV, kaj daŭrigon de la eldonlaboro. La etoso estis nekutime serena.

“Internacia Solidareco” estis la ĉefa kongresa temo, pritraktita en debatoj enkondukitaj per prelegetoj: *Socipolitika situacio en Tanzanio* (Mramba Simba), *Enmigrado* (Jakvo Schram), *Monda solidareco kontraŭ la malsato* (Daniel Durand), *Semo-produktado kaj -uzado* (Robin Beto), *Liberaj programoj* (Petro Cardona), *Malarmado* (Colette Weiss), *Spertoj en la pasinta MSF en Najrobo* (Mramba Simba kaj Etel Zavadlav), *Personoj en handikapiga situacio* (Gerardo Lieblang), *Klasbatalo mia amiko / klasbatalo mia malamiko* (Jakvo Schram).

La kultura programo rekordis kompare kun aliaj SAT-kongresoj per kvar koncertoj — de *Kosmopolitoj*, FAMo, Olivier Herbay kaj JoMo kaj *Liberec-anoj* — kaj per dramaj prezentoj de Jocelyne Monneret kaj Franciska Toubale.

Aparte kuraĝigaj post financaj kapdoloroj, kiujn la Asocio akute sentas de kelkaj jaroj, estis la unuaj laborfruktoj de la Eldona Fakoj Kooperativa de SAT. Ĝustatempe por la kongreso estiĝis libro per kunlaboro de 20 kamaradoj: *Mortopuno: faktoj & dokumentoj*. Alia ĵusa SAT-eldonaĵo estas la libro *Ĉu ili diras al ni la veron?* kun atestaĵoj pri nordkoreaj retenejoj por politikaj mal-liberuloj. Dumkongrese alvenis ankaŭ novaj glumarkoj kaj T-ĉemizoj de la eldonkooperativo (vd. la supran foton).

La membronombro plu evoluas maltrankvilige. SAT havas laŭ la lasta kalkulo 724 membrojn. Ŝajnas, ke la enspezoj el kotizoj kaj donacoj sufiĉos por kovri la neprajn elspezojn dum la venonta tempo, ankaŭ por laborigi la oficiston Kreŝimir Barkoviĉ ĝis lia emeritiĝo post 20 monatoj. Sed membrovarbado restas grava zorgo. Oni prezentis novan varbmateriaron de SAT-Amikaro, kies enhavon parte influis diskutoj kadre de la Poresperanta Fakoj pri specifeco de Esperanto-informado direktata al maldekstra publiko. Oni proponas traduke adapti ĝin al aliaj lingvoj.

Nekutimaĵo ĉi-jare estis kvintaga postkongreso — staĝo ĉe Kvinpetalo en Bouresse pri Lanti kaj sennaciismo. De pluraj jaroj rekreskas orientiĝo al sennaciismaj ideoj ĉe iuj SAT-anoj kaj ne-SAT-anoj. Nun 7-8 partoprenantoj seminariis pri la historio de sennaciismo, la sennaciisma SAT-frakcio kaj la epoko, en kiu ambaŭ naskiĝis. Pliaj temoj estis la naciismo, la (eŭropa) novdekstrismo kaj la kelkfoja kuntuŝiĝo de la “neŭtrala” Esperanto-movado kun ĝi. Daniel Durand prezentis dum duona tago la mond-civitanismon.

Gary Mickle

En la varmega Andaluzio

La Hispana Kongreso de Esperanto okazis 5–8 jul, kune kun la Esperanto-Kongreso de Andaluzio, suda regiono de Hispanio.

La kongresejo situas en la urbeto Palos de la Frontera, de kie eliris Kristoforo Kolumbo kun kuraĝaj maristoj en sian unuan vojaĝon al la “nova” kontinento. Eblis turismadi en kelkaj lokoj rilataj al la malkovro de Ameriko; proksime en la monaĥejo La Rábida, kie la naviganto gastis antaŭ sia forveturo, estas modernaj modeloj de la tri ŝipoj uzitaj en la vojaĝo.

La kutima somera varmo reganta en Andaluzio ne senkuraĝigis kontentigan ĉeeston de hispanoj kaj eksterlandanoj — venis entute 85 partoprenantoj.

La kleriga programo estis riĉa.

Akademiano Francisko Simonnet pledis por konservado kaj respekto al minoritataj lingvoj kaj prezentis la asocion *Libero por la lingvoj*. Ĝenerala sekretario de EEU Zlatko Tišljariĉ pri-skribis la rolon de lingvo en la popola identeco kaj konkludis ke nur per komuna neŭtrala lingvo kiel esperanto estos ebla eŭropa identeco. Pri virinoj en la Esperanto-movado prelegis Gražina Opulskienė (Litovio), evidentiĝis ke kvankam oni ne memoras nomojn de multaj famaj esperantistinoj, virinoj ja havas gravan rolon en nia movado.

Augusto Casquero montris fotojn pri sia vivo en Ĉinio kaj rakontis pri siaj spertoj en tiu lando kaj pri la plej frapaj kulturaj diferencoj.

La pola filmreĝisoro Roman Dobrzyński prezentis kelkajn siajn dokument-filmojn, iuj el ili kun temo rilate al Hispanio, lando kiun Dobrzyński bone konas.

La Iber-skola verkisto Miguel Gutiérrez Adúriz, konata ankaŭ sub la pseŭdonimo Liven Dek, prezentis sian novan instrumentodon, bazitan sur la intuicio de la lernantoj kaj ne per libroj aŭ gramatiko.

Muziko ankaŭ abundis. Dolĉaj kantoj de la duopo Ĵomart kaj Nataŝa, kun akompano de ilia filino Karina, karesis la orelojn de la aŭskultantoj. Eduardo Navas, pli konata kiel Solo, prezentis elektronikan muzikon inkluzive de sia renovigita versio de *La Espero*.

Ludis ankaŭ loka flamenka grupo, kun kantisto kaj junaj dancistinoj vestitaj per la tradiciaj andaluziaj kostumoj.

Jorge Pavón

Altnivela kongreso de EEU

Inter 28 jul kaj 4 aŭg okazis la sepa kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Maribor (Slovenio) kun 256 personoj el 29 landoj.

Unuafoje partoprenis en Esperanto-aranĝo samtempe du anoj de la Eŭropa Parlamento: Małgorzata Handzlik (Pollando) kaj Ljudmila Novak (Slovenio).

Kadre de la konferenco “Interkultura dialogo kaj komunikado” prelegis ambaŭ EU-parlamentanoj.

Małgorzata Handzlik klarigis la lingvan sistemon en organoj de EU kaj kostojn de la multlingvismo, dum Ljudmila Novak parolis pri neceso fortigi la interkulturan dialogon. Enkonduke ŝi klarigis ke en sia junaĝo ŝi lernis Esperanton kaj eĉ partoprenis en du TEJO-kongresoj. Dum la akcepto en la urbestrejo ŝi promesis estonte laŭokaze prezenti Esperanton en Komisiono por Kulturo de la Eŭropa Parlamento kaj proponis organizi ekspozicion pri Esperanto en la Eŭropa Parlamento, kion Małgorzata Handzlik tuj subtenis kaj ili interkonsentis estonte kunlabori pri Esperantaj aferoj en la Eŭropa Parlamento.

En sia letero sendita al la kongreso, doktoro Marko Pavliha, parlamentano en la slovena parlamento, promesis transformi la finan dokumenton de la kongreso al iniciato de parlamentano transdonota al la slovena registaro.

La kongreso akceptis finan dokumenton en formo de letero al la slovena registaro, kiu en la unua duono de 2008 prezidos la Konsilion de Eŭropo. La dokumento havas kvin punktojn, inter kiuj estas peto subteni iniciaton de slovak vicprezidanto Čaplovič peti la Eŭropan Komisionon aranĝi je interregistara nivelo okupiĝon pri lingva politiko, iniciati fondon de nova fondaĵo en EU, kiu financus malpli grandajn neregistarajn organizojn kiuj havus projektojn subtenantajn edukon pri eŭropa konscio, peti la registaron subteni la iniciaton de Marko Pavliha enkonduki en la eŭropajn lernejojn nedevidigan studobjekton “Edukado por eŭropa konscio” kies parto estus lernado de Esperanto, kaj peti la registaron uzi en sia informado dum 2008 ankaŭ Esperanton.

Okazis ses prelegoj rilataj al la kongresa ĉeftemo “Akvo” kaj faka ekskurso en la akvokonduka sistemo de Maribor.

La kultura programo estis tre abunda. Prezentiĝis tri teatraĵoj el kiuj du en



la operteatro de Maribor. Temis pri teatraĵoj de Saša Pilipović el Kragujevac (Serbio) *Galileo*, de Drama grupo de Studenta Esperanto-Klubo el Zagrebo (Kroatio) *Kosma ŝipo Ludoviko antaŭ la muro de la mallumo* kaj spektaklo de franca aktoro Henri de Sabates *Stilaj ekzercoj*.

Okazis du koncertoj de klasika muziko (orgena kaj piana) kaj kvar koncertoj de amuzmuziko en kiu partoprenis Georgo Handzlik, Attila Schimmer, Solotronik kaj JoMo.

Tre specialaj aranĝoj estis dum la interkona vespero kiam okaze de la 120-jariĝo de Esperanto prezentiĝis grandega torto en la formo de Esperanto-flago kiu estis distribuita al ĉiuj kongresanoj.

Samtage estis solene publike levita Esperanta flago sur la urbocentra Placo de Libereco. Ĉiutage oni prezentis kelkajn filmojn subtitolitajn en Esperanto, kaj la junularo havis apartajn amuz-programojn en la studenta hejmo.

Sur la monto Pohorje super Maribor okazis infana kongreseto kun naŭ infanoj el kvin landoj sub la gvido de Judita Rey el Kroatio.

Eŭropa Esperanto-Unio havis du kunvenojn de la asembleo en kiu ĝi traktis la raportojn kaj planojn por la estonto kaj decidis atribui apartan agnoskon kaj proklami Etsuon Miyoshi sia honora membro, pro lia eksterordinara kontribuo al diskonigo de Esperanto en Eŭropo.

Granda atingo de EEU estis, ke la EU-fondaĵo por kulturo kaj edukado *Aktiva civitaneco* subtenis la konferencon pri interkultura dialogo kaj komunikado per 25 mil eŭroj, verŝajne la plej granda financa subteno fare de EU al iu Esperanto-organizo.

Reago de amaskomunikiloj pri la kongreso kaj Esperanto estis ekstreme granda.

La sekva kongreso de EEU okazos en la Esperanto-urbo Herzberg en Germanio.

Zlatko Tišljar


(Laŭ *Libera Folio*)

Jubilea kongreso en Rio

8–13 jul en Rio-de-Ĵaneiro okazis la 42a Brazila Kongreso de Esperanto kaj la 27a Kongreso de la Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO).

Ĝi estis jubilea kongreso, ĉar oni festis la centjariĝon de la nacia Esperanto-organizaĵo, Brazila Esperanto-Ligo (BEL), la kvardekjariĝon de BEJO kaj ankaŭ la centdudekjariĝon de Esperanto.

Al ĝi aliĝis 553 personoj kaj ĉirkaŭ 500 sekvis la plurajn eventojn okazintajn: kvardek prelegoj, fakaj kunsidoj (Oomoto, Spiritistoj, Legio de Bona Volo k.a.), diskutado pri la kongresa temo (Cent Jaroj de la Esperanto-Movado en Brazilo: strategioj por la estonto), kursoj, infankongreseto, prezentado de filmoj, artaj vesperoj, lanĉoj de filmo (*La Patro*) kaj de pluraj verkoj de la brazila literaturo en Esperanto (*La Alkemiisto*, *Don Casmurro*, *Brazila Esperanta Parnaso* kaj aliaj).



En la Ĝenerala Asembleo de BEL, gvidita de Sylla Chaves, estis elektita per aklamado la nova estraro por la oficperiodo 2007-2010, sub la devizo “Paco kaj Kunlaboro”:

Prezidanto: José Passini, Vic-Prezidanto: Paulo Sérgio Viana, Unua Sekretario: Carlos Maria, Dua Sekretario: Francisco Wechsler, Tria Sekretario: Alfredo Aragón, Prezidanto de la Federacia Konsilantaro: Wandemberg Ribeiro Moraes, Financa Direktoro: João Osvaldo Pestana, Kasisto: Maria das Dores Goes.

En la brazila kongreso partoprenis trideko da eksterlandaj esperantistoj (japano, koreo, hispano, portugalo, pluraj germanoj, poloj, argentinanoj kaj urugvajanoj).

La venonta 43a kongreso okazos en Fortalezo, nordoriente de Brazilo, en julio 2008.

Aloísio Sartorato

SenPrograma Renkontiĝo

SPR! — la SenPrograma Renkontiĝo, organizita de Kataluna Esperanto-Junularo, Valencia Esperanto-Junularo kaj *Varsovia Vento* — okazis 16–22 jul en Valencilando, pli konkrete en la urbo Callosa d'en Sarrià, proksime de Alakanto, en unu el la plej sudaj regionoj de la Kataluna Landaro. Tute ne estis strikta programo, sed la partoprenantaro decidis kion kaj kiel fari; ĉiutage diversaj skipoj okupiĝis pri la aktivadoj, la programeroj, la trinkejo, la gufujo, la muziko, la etoso, la manĝaĵo, ktp.

La tendumejo estis ekipita de duŝoj, necesejoj, rostokradoj kaj aliaj servoj... Ĝia situo estis perfekta, ĉe la fontoj de la rivero Algar, loko kie oni povas plonĝi en riveron, promeni tra apudaj belaj vojetoj, ĝui akvofalojn kaj lagetojn, viziti la muzeon pri la medio kaj la muzeon pri la akvo sen forgesi la eblecon trairi la promenejon de la aromaj plantoj.

La partoprenantoj estis ĉefe dudekelk-jaraj junuloj, kvankam partoprenis ĉiuaĝaj homoj; la plej juna estis mi mem, 15-jara knabino, kaj la plej maljuna estis Robèrt el Okcitanio, kiu aĝas 59.

La nombro de novuloj estis preskaŭ duono de la tuta partoprenantaro, mi mem spertis mian unuan internaciskalan renkontiĝon, kaj revenis hejmen pikita de la verda viruso danke al interrilato kun homoj konantaj la Esperantan kulturon.

Sesdedko da partoprenantoj el Portugalio, Hispanio, Eŭskio, Kataluna Landaro, Okcitanio, Francio, Belgio, Nederlando, Pollando kaj Ruslando, etosisis la renkontiĝon kaj internaci-



igis ĝin bruligante en fajro la surpapere pentritajn flagojn de siaj landoj aŭ nacioj en malsolena internaciiga vespero kie eĉ urbaj, regionaj, futballklubaj kaj aliaj flagaj fetišoj estis bruligitaj dum oni kantadis ties respektivajn himnojn.

Male kaj solene, la magistrato de la urbo akceptis reprezentantojn el ĉiuj landoj, kaj la urbestro dediĉis ĉarmajn vortojn al Esperanto.

Lokaj esperantistoj donacis al la urbo specialan eldonaĵon de la *Amkan-toj* de la fama mezepoka valencia poeto Ausiàs Marc, kie apud la katalunaj versoj aperas la esperantigo de Abel Montagut. Polaj reprezentantoj donacis botelon da plej bona vodka.

Reciproke, la magistrato oferis al ĉiu portanto de la ŝildo de la renkontiĝo senpagan eniron en la plonĝareoj de la rivero, en la municipan naĝejon,

en la sportejon, kaj donis al SPR! ĉiujn eblajn faciligojn.

La valencia televida kanalo *Canal 9* sendis ĵurnaliston kaj du kameraojn kaj kontaktis kvarfoje kun la SPR-ejo en tre simpatia rekta dissendo televida.

Malgraŭ la senprogrameco, en la renkontiĝo okazis multaj aktivadoj. Ĉiutage Irek Bobrzak gvidis al novuloj Esperanto-kurson per rekta metodo, aliaj esperantistoj aranĝis siazorge kursojn pri la kataluna kaj la eŭska. Eĉ okazis ateliero de toki-pona, kie la ĉeestantoj lernis la bazon de tiu ĉi lingvo kaj la avantaĝojn de ĝia uzo.

Aliflanke, la lokaj katalunoj montris sian kulturon al eksterlandanoj, kiuj lernis tradiciajn dancojn kaj aliajn lokajn kutimojn kiel trinki per tradicia bekkruĉo “porró”, kaj ankaŭ okazis ateliero pri homturoj (*vidu la foton*) malgraŭ tio, ke nur du esperantistoj spertis. Krome, oni organizis ekscitan ŝakturniron kaj nia portugala amiko Alcino aranĝis ekspozicion pri la lokaj aromaj plantoj per kiu ni lernis ties esperantaj nomoj. La plaĝo troviĝis sufiĉe proksime aŭte kaj kelkaj plaĝumis, ankaŭ oni ekskursis tra la montaro ĝuante belegajn pejzaĝojn.

Tamen la plej vivoplena kaj amuza programero okazis sendube ĉiun nokton. Tiam oni spontanee organizadis grandajn festojn kun multaj spontaneaj aranĝoj kiel ekskursoj al la rivero, babiladoj, ludkartoj, amuzaj ludoj, konkursoj de tintiloj (temas pri laŭtvoĉe kalkuli tintilojn dum oni trinkas vinon aŭ bieron pere de la bekkruĉo), ktp. Ankaŭ foje la muzikistoj elingigis siajn muzikilojn kaj kune ludis bonan muzikon. En ĉi tiu renkontiĝo partoprenis bonaj muzikistoj ludantaj grandan diversecon da muzikiloj: gitaroj, akordiono, mandolino, violono kaj la tradiciaj katalunaj flaĝoletoj. Ĉio ĉi kontribuis al festa etoso kio ebligis la duelon de improvizaĵaj kantoj kaj la kunkantadon. Kompreneble, ankaŭ estis trinkejo kaj danco kie oni povis drinki, danci, paroli aŭ krokodili, ĝuante bonan muzikon.

Mia opinio, kiel plej juna partoprenanto, estas tre bona, ĉar mi multe plibonigis mian Esperanton kaj akiris fluecon, interŝanĝis vidpunktojn kun fremduloj, festumis, amuziĝis, ĝojis, ekkonis pli bone la Esperantan kulturon kaj ĉefe ĝuis bonegan etoson en bona akompano. Mi tre dankas al la organizantoj!

Anna Raventós i Gascon

(Fotoj de Armelle Piolat)



Pluraj kunvenoj en Trondheim

16 jun 2007 Grupo Esperantista de Trondheim (GET, fondita en 1907) festis sian 100-jariĝon per jubilea festeno kadre de la Landa Kongreso de la norvegaj esperantistoj.

GET estas aktiva klubo kun plejparte junaj membroj, sed kun forta sento de tradicio. La klubo ne nur regule kunvenas, sed ĉiun jaron nepre aranĝas Zamenhof-feston en decembro kaj Ĝardenan Feston en junio, kun bonaj manĝaĵoj kaj tortoj, kaj ĉiam kun kromludado. Ĉi-jare la fruaj alvenintoj al la Landa Kongreso povis ĝui ankaŭ tiun feston.

Okaze de sia jubileo, GET ricevis gratulojn de esperanto-societoj kaj en kaj ekster Norvegio. Dum la jubilea festeno oni laŭtlegis inter alie gratulon de Esperanto-societo *Antaŭen* en Tampere. Poste okazis kantado kaj de pompaj Esperanto-himnoj kaj de tradukitaj norvegaj popolkantoj, kaj Torstein Kvakland laŭtlegis iom de malnovaj kunvenprotokoloj de la kluba arĥivo. Tiamaniere oni sukcesis rekrei tian etoson, kia oni povas imagi ke ĝi estis en la fruaj jaroj, lerte kombinante flaman-tan amon al hejmo, patrujo, naci' kun fiera sento de aneco en internacia rondofamilia!

Otto Prytz, veterano de la norvega Esperanto-movado, faris dankparoladon dum la festeno kaj konstatis (ne por la unua fojo), ke trondhejmanoj vere scias kiel jubilei.

Dum la kongreso okazis ankaŭ la Landa Kunveno de la Norvega Esperantista Ligo (NEL, fondita en 1911). Ĉi-jare la defioj de la Landa Kunveno estis multaj, ne malplej pro krizoj kaj en la ekonomio kaj en la distribuado de produktita informmaterialo. Sed post la dutaga kunveno, la partoprenantoj ŝajnis esti kontentaj.

Sekcioj de NEL kaj aliaj norvegaj Esperanto-organizoj kaptis la okazon de la landa kongreso, kiam pluraj aktivaj esperantistoj en la lando aperas samloke, por okazigi siajn proprajn jarkunvenojn kaj elektojn.

Okazis la jarkunveno de la norvega eldonejo *Esperanto*, kiu decidis malfondiĝi pro plurjara manko de mendoj. La ĉefaj kialoj ŝajnas esti ke la merkato ŝrumpis kaj ke norvegaj esperantistoj preferas mendi siajn librojn rekte de eksterlando per Interreto.

Samloke kaj -tempe okazis ankaŭ la Landa Kunveno de la Norvega Junularo Esperantista.

Ulf Lunde



Muzikistoj festludas en Trondheim (Fotis Ulf Lunde)

Denove somera printempo

12–20 jun 2007 okazis en Mielno (Pollando) la 29a Ĉebalta Esperantista Printempo kun 80 esperantistoj el 12 eŭropaj landoj.

Naciaj flagoj de ĉiuj landoj, el kiuj venis gesamideanoj, gaje flirtis en la vento kaj kune kun Esperantaj flagoj ornamis blankajn panelojn, sur kiuj videblis verdkoloraj surskriboj: *Ĉebalta Esperantista Printempo* kaj *Eŭropa Unio bezonas la lingvon Esperanto*. Ĉiu partoprenanto ricevis grandan koverton kun Esperanto-materialo, inkluzive de ekzemplero de *La Ondo de Esperanto*.

En la inaŭguro, dum kiu ĉeestis komunumestro de Mielno Zbigniew Chojiński, ĉiujn bonvenigis Czesław Baranowski, ĉeforganizanto de ĈET ekde 1991 kaj samtempe prezidanto de PEA-Filio en Koszalin. Post salutparoloj de reprezentantoj de ĉiuj landoj sekvis distra parto preparita de Urszula Giercarz kun la grupo da kantemuloj. La unuan tagon kronis tradicia interkona vespero kun bona muziko.

La sekvontan tagon komenciĝis realigado de riĉa kaj varia ĈEP-programo, en kiu troviĝis i.a. interesaj prelegoj, rakontoj, belaj videofilmoj, ĉiutaga lingvoperfektigado en tri grupoj, ekskursoj kaj lernado de Esperanto-kantoj.

Neforgeseblajn impresojn lasis la adiaŭa vespero ĉe bivakfajro kun kolbasetrostado, biertrinkado kaj gaja kantado. La lastan tagon ĉiuj esprimis sian grandan kontenton pro la organiza flanko de ĈEP, pro la interesa programo kaj pro neripetebla etoso.

Czesław Baranowski

Esperanto-tendaro sen Esperanto

En la tri etapoj de la ĉi-jara Somera Esperanto-Tendaro en Lančov (Ĉeĥio) la infanoj lernis la lingvojn anglan, germanan kaj hispanan, tamen ili estis informataj ankaŭ pri Esperanto. En la tria etapo unu knabino eĉ forkuris el la angla kurso, kie ŝi enuis (ŝi jam tralegis la lastan volumon de Harry Potter en la originalo) kaj lernis intense Esperanton.

En la lasta semajno de tiu etapo deko da plenkreskaj esperantistoj diskutis, kiel labori por Esperanto en la nuna tempo. La ŝancon ili vidas en la interreto, kie kreskas elektronikaj bibliotekoj kaj enciklopedioj, sistemoj de informoj por turistoj.

Planataj estas lernolibroj de fremdaj lingvoj kaj aliaj fakoj per Esperanto, sciencaj artikolaroj kun Esperanto kiel pilota lingvo.

Por la konkretaj projektoj eblas serĉi monrimedojn de sponsoroj kaj mecenatoj. Samtempe necesas instrui esperantistaron pri projektoj ekster Esperantujo (Socrates, Gutenberg, Komuna referenckadro pri lingvoj k.s.). Tial ili planas aranĝi printempe 2008 seminariojn.

Fine de la tria etapo okazis jam la deka renkonto de iamaj tendaranoj, kiuj venadis dum sia juneco, kiam la tendaro estis ankoraŭ plene esperantista.

Nun kunvenis kvindeko da personoj por rememori ankaŭ la fakton, ke la ĉi-jara tendaro estas jam la 55a, kvankam la unuaj kvar okazis en aliaj lokoj (do venontjare okazos la kvindeka SET en la sama loko).

Miroslav Malovec

Usona kongreso en Meksiko

La granda verda flago de Esperanto aperis apud la strato ĉe la landlimo inter Meksiko kaj Usono, inter la flagoj de Usono kaj Meksiko, kaj tiu de la UN. 97 Esperantistoj partoprenis 17–30 jul 2007 la landan kongreson de Esperanto-USA en la hotelo *Pueblo Amigo* en Tijuana, Meksiko.

La temo de la kongreso estis *Internacia Kunlaboro*, kaj la partoprenantoj vere ĝuis la internacian amikecon kun la alilandaj samideanoj. Prof. Duncan Charters sperte liveris la ĉefan prelegon pri “Amikeco trans landlimoj”.

Tio estis la unua jaro por la nova *Harlow Premio*, kiu omaĝas al Don Harlow. La *Harlow Premio* estas konkurso kun kvin premioj por la traduko de usona literaturo en Esperanton. Gajnis Per Arne Fritzon, Christopher Zervic, George Baker, Rull Williams, kaj Kris Long. Esperanto-USA rajtas eldoni la verkojn en la bulteno *Esperanto USA* kaj en venonta libro *Usona Antologio*. Estras la projekton Tim Westover, estro de la eldona komitato por Esperanto-USA.

Dumtempe Ron Glossop, prezidanto de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, instruis komencantojn.

Lusi Harmon iĝis honora membro de Esperanto-USA per unuanima voĉdonado, pro grandaj kontribuoj al la movado, aparte pro la laboro por la instrua filmserio *Esperanto – Pasporto al la Tuta Mondo*.

La plej interesa propono, kiu sukcesis per granda marĝeno, estas ke ELNA, la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ne plu uzos tiun nomon, sed nun agas sub la nomo de Esperanto-USA. La antaŭa nomo ne bone priskribas la organizaĵon. Por fari honoron al niaj najbaraj landoj, Kanado kaj Meksiko, kaj por respondi al la konfuzo, kiu aperis pro la nomo, kaj por fari pli bonan internacian kunlaboron, la nomo nun estas Esperanto-USA. La estraro kaj la Centra Oficejo faras la ŝanĝojn laŭ bezono por realigi la nomŝanĝon. Esperanto-USA estas la sama organizaĵo, sed kun nova spirito por internacia kunlaboro.

Ankaŭ per la balotiloj gajnis deĵorojn esti estraranoj Ĵenja Amis, Anjo Harlow, Christopher Zervic, kaj Tim Westover. Julie Spickler elektigis kiel sekretario.

Unu el la multaj interesaj kunsidoj temis pri la Amerika Komisiono. D-ro Steve Brewer, la reprezentanto de Esperanto-USA por tiu komisiono de



UEA, estris la kunsidon, kaj venis multaj ideoj pri kiel pli bone kunlabori en tiu fako de UEA.

Antaŭ la kongreso la estraro de Esperanto-USA aferkunsidis en San-tee, Kalifornio, kaj aliaj ekskursis en suda Kalifornio al la Universitato de Kalifornio ĉe San Diego, kie okazis NASK, la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto. Post la kongreso partoprenantoj ekskursis al Baja (suba) Kalifornio, Meksiko, apud la marbordo, al Ensenada.

La kongreso sukcesis ĉefe pro la granda laboro de Mar Cardenas, la estrino de la LKK.

Filipo Dorcas

prezidanto de Esperanto-USA

Por EDE-sekcio en Hungario

La sepa politika renkontiĝo ĉe Balatono (Hungario) 1–3 jun 2007 havis jenajn ĝeneralajn konkludojn:

a) Lastatempe la intereso ene de la Esperanto-movado pri politika agado pligrandiĝis. Ĝisnunaj skeptikuloj ŝanĝis la opinion kaj promesis apogon.

b) La turniĝo al la ekstera mondo, estas esence grava por la movado.

c) Turniĝo eksteren aŭtomate elvokos politikan reagon, al kiu devus esti Esperanto politike reagota.

La partoprenintoj emfazis la priparolatajn enhavojn kaj decidis jenajn agojn por la estonteco:

1. Fondi hungaran sekcion de la tuteŭropa partio EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) jam ekzistanta en Francio kaj Germanio. Por la fondo de partio necesas dek personoj.

2. Fondi hungaran ret-diskutliston de EDE por eŭrop-politikaj demandoj, kie eblas Esperante kaj hungare aldoni la opiniojn. [La listo jam ekfunkciis.]

3. Organizati “infotablojn” por Esperanto laŭ la metodo de la tradiciaj Munkenaj agoj. La unua infotablo okazos 15 sep en Budapeŝto.

Eŭgeno Macko

La 102a kongreso skota. Kiu pli?

Vere ĝuinda estis la 102a Skotlanda kongreso de Esperanto (Lanark, 15–18 jun 2007), vige gvidata de la prezidanto, David Kelso. 35 homoj partoprenis el ok landoj.

La gastpreleganto estis Vladka Chvatalova, kiu laboras kiel tradukisto en EU. Ŝi helpis nin penetri la lingvan ĝangalon de Bruselo, kaj ankaŭ prelegis pri nekonataj facetoj de la ĉeĥa kulturo. Aliaj prelegis pri *La Infana Raso*, la utopiisma socialisto Robert Owen kiu laboris en New Lanark, la fundamentaj trajtoj de lingvistiko, kaj pri la projekto por traduki la blogon de la vicedestrino de la Eŭropa Komisiono.

Oni bankedis kaj manĝetis. Kelkaj Diservis, kelkaj fiservis! Estis gvidataj rondiroj de histoririĉaj Lanark kaj New Lanark. Lunde kelkaj ekskursis al la valo Clyde kaj al la malnova urbeto Biggar.

Andreo Weir, nia nova vicprezidanto, estas eble la plej juna en la historio de la skota movado!

Venont-jare ni kongresos en Inver-shin, en la plej norda skota graflando. Ni intencas verdigi ĝin!

David W. Bisset

Nova estraro en Ĉilio

(**Landa_Agado**) 30 jun ĉilia esperantistaro kunvenis solene ĉe la Instruista Domo en Santiago de Ĉilio — la ĉefurbo — por ĝui la etoson, kiun nur la Esperanto-movado povas doni.

Matene ekfunkciis ekspozicio de filatelaĵoj, organizita de Ivan Mättig; poste ni havis prelegeton de José Antonio Vergara pri la historio de Esperanto en Ĉilio, kiu alportis verajn novaĵojn tute nekonatajn al pluraj el ni.

La gastiganto — Ĉilia Organizo de Geinstruistoj — prezentis al ni la nunan situacion pri la instruado de la franca kaj germana lingvoj laŭ la nuna priedukada leĝo, kiu nepre senlaborigos ilin pro la preskaŭ deviga instruado de la angla.

Poste ni diskutadis pri la ĉilia Esperanto-movado, kiel disvastigi la lingvon inter ĝejnuloj, kaj redoni vivon al lokaj kluboj. Oni decidis pri la loko kie okazos la venontaj renkontiĝoj kaj elektis novan estraron — Prezidanto: Hector Campos, Ĝenerala Sekretario: Daniel Muñoz, Kasisto: Daniel Carrasco, Estrarano pri Instruado: Ivan Mättig. Estrarano pri Junularo: Leonardo Varas.

Hector Campos



Ensemblo *Animo* el Liepaja (Latvio), sub la gvido de Austra Pumpure, prezentis en Ŝiauliai latvaj kaj diversnaciajn kantojn en Esperanto kaj en la latva. (Fotis Choe Taesok)

La plej granda BET ĉi-jarmile

La 43aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en nordlitovia urbo Ŝiauliai kun 322 partoprenantoj el 18 landoj iĝis la plej amasa BET en tiu ĉi jardeko (jarcento kaj jarmilo).

BET-43 pasis 14–22 jul en modernaj ejoj de la fakultato de sociaj sciencoj de la urba universitato. Esperantistoj senpage uzis teknikojn, inkluzive de pluraj komputiloj kun retaliro.

La urbaj aŭtoritatoj montris grandan interesiĝon kaj helpemon. La urbestro Genadijus Mikšys faris malferman paroladon; li ankaŭ akceptis tridekon da diverslandaj esperantistoj en la urbo-domo. Sed en gastamo lin superis la dekano, d-ro Teodoras Tamošiūnas, kiu abunde regalis **ĉiujn** partoprenantojn. La urbaj turisma kaj informa oficejoj helpis per eldono de gvidlibro en Esperanto, disponigo de materialo, preparo de ekskursoj. Subteno al la kultura programo ebligis fari ĝin varia kaj riĉa. BET-43 iĝis grava ankaŭ landskale, kaj la prezidanto de la litovia parlamento Viktoras Muntianas en sia salutmesaĝo emfazis, ke “agado de esperantistoj donas signifan impulson al la reciproka kompreno kaj kunlaboro de la popoloj”.

Kun entute dudeko da prelegoj funkciis Somera Universitato, kies programon Osmo Buller salutmesaĝe konstatis supera al la Internacia Kongresa Universitato en Jokohamo. Dunivelaj kursoj kun kvar instruistoj en bona etoso progresigis lernemulojn. Al la 80-jariĝo de la movado en Ŝiauliai estis dediĉita la libro *Ruto levis Esperon*, lanĉita en BET. Alia librolanĉo prezentis la longe atenditan reeldonon de *La Mastro de l' Ringoj* de Tolkien. Streĉa konkurado okazis en

la literatura kvizo de *La Ondo*, en kiu venkis Petras Čeliasukas. Li ĉiutage enkondukis alilandanojn en la litovajn lingvon, literaturon kaj kulturon. Post longa paŭzo reokazis belarta konkurso *Muzo*. Ĉiutage sub redaktado de Choe Taesok aperis *Sagisto*, kies titolo aludas la simbolon de la urbo.

Populareco de ekskursoj eĉ iom damaĝis la programon, dezertiginte la ejojn. Esperantistoj svarmis ne nur en la universitato, sed ankaŭ en kafejoj en la urbocentra promenstrato. Graĵina Opulskienė konstatis tion kaj eksterplane persvadis pli ol kvindekon da diverslandaj esperantistoj kune pasigi vesperon en subĉiela gastejo, kie vigla muziko ne dancigis nur lamulojn.

La sukceso de BET estas rezulto de longa preparlaboro, al kiu kontribuis la prezidanto de la landa asocio Povilas Jegorovas kaj multaj litoviaj aktivuloj, precipe, honora civitano de Ŝiauliai Zenonas Sabalys kaj la sekretario de LitEA Jūratė Pupšaitė.

Halina Gorecka

En la ĉefurbo de Litovio

15 jun 2007 la nova urbestro de Vilno Juozas Imbrasas akceptis la prezidanton de la Litova Esperanto-Asocio (LitEA) Povilas Jegorovas kaj vilnan esperantiston-jurnaliston Audrys Antaitis. Estis priparolitaj demandoj pri konstanta ejo por la Vilna Filio de LitEA, pri eventuala organizado de la kongreso de esperantistoj-jurnalistoj en Vilno somere 2008, kiun organizus kune Litova Ĵurnalista Asocio kaj LitEA, kaj aliaj aktualaj demandoj de komuna intereso.

Povilas Jegorovas

Familia renkontiĝo

La 29a Renkontiĝo de Esperanto-Familioj (REF) estis organizita 22 jul – 4 aŭg 2007 en la feriejo Tiszafüredi Ifjúsági Tábor en la pitoreska montaro Bük 160 km oriente de Budapeŝto. Partoprenis dudeko da familioj, entute 68 partoprenantoj.

La programo dependis de la kontribuoj de la partoprenantoj mem: komuna kantado, manlaboro, desegnado, sportludoj, muzikado, lingvaj ludoj, fabelolegado kaj -verkado, naĝado, migrado, preskaŭ vespere tendarfajro ktp., kaj estis antaŭorganizitaj programoj, diversaj ekskursoj al belaj hungaraj urboj (Miskolc, Kazincbarcika, Szilvásvárad, Eger kaj al termostrandoj en la ĉirkaŭa regiono).

La internacia partoprenantaro montogrimpis, vizitis termobanejojn, vojaĝis per la montara historia trajneto. Krom feriado, la ĉefa celo de la aranĝo estis aktivigi esperantan lingvokapablon de la infanoj. Dum la du semajnoj la pli aĝaj gejunuloj kaj la plenkreskuloj kune kantis, ludis, sportis kun etuloj, kiuj ĉi tiel ludante lernis.

Julianna Vas-Szegedi

Partikongresa iniciato

Inter la delegitoj de la kongreso de la finnlanda partio Maldekstra Alianco (Helsinki, 15–17 jun 2007) estis du Esperanto-aktivuloj — Antero Harju el Järvenpää kaj Tuomo Grundström el Rauma.

La kongreso akceptis partiprogramon kaj trijaran agadprogramon. Nia iniciato, subskribita ankaŭ de Erkki Röntynen el Oulu, menciis Esperanton kiel solvon de la internacia lingvoproblemo estis verŝajne tro radikala (finvenkisme formulita) por la programo, kiu tamen ja akcentas lingvajn rajtojn kaj egalecon.

Ni partoprenis la ĝeneralan diskuton kaj havis multajn bonajn kontaktojn kun aktivuloj kaj parlamentanoj. Pluraj estis informitaj.

La partio sin difinas demokrata organizo de progresema forto por laboro kaj naturo, ruĝa kaj verda, maldekstre de socialdemokratio, kun radikoj en la socialisma idearo. Similaj alilande estas ekzemple germana “Die Linke”, sveda “Vänsterpartiet” kaj nederlanda Socialista partio. Nun opozicia, Maldekstra Alianco havas 17 deputitojn en la 200-membra parlamento, kaj unu MEP, en la grupo GUE/NGL.

Tuomo Grundström

Somera kurso en Valamo

En la Popola Instituto de Valamo, situanta en la areo de la monaĥejo Valamo en komunumo Heinavesi (Finnlando), 23–27 jul okazis denove Esperanto-kurso en internacia etoso kun 12 kursanoj el Finnlando, Svedio kaj Nederlando.

Ĝi estis la oka sinsekva kurso aranĝita kunlabore de la Popola Instituto kaj Esperanto-Asocio de Finnlando. La ĉefinstruisto estis Atilio Orellana Rojas kaj kursogvidanto kaj helpinstruisto Tiina Oittinen, sekretario de EAF. La kursanoj dividiĝis en du grupoj laŭ iliaj lingvoscioj kaj estis instruitaj kaj gviditaj de ambaŭ instruistoj. Ambaŭ grupoj diligente laboris en ĝoja atmosfero. En la daŭriga grupo dum multaj lecionoj estis diskutitaj finnaj kutimoj kaj antaŭjuĝoj pri finnlandanoj kaj aliaj nacioj.

La kursosemajno jam havas siajn proprajn tradiciojn, ekzemple, esperantlingvan rondiradon en la monaĥeja areo: denove lerte ĉiĉeronis Jukka Laaksonen. Ĉar ĉi-jare eblis vizito en Valamo antaŭ la festivalo *Arta Lumo*, Jukka havis vendrede la duan ĉiĉeronadon esperante por la kvin vizitantoj. La gastoj el Italio, Germanio, Francio kaj Finnlando, venis al Valamo jam ĵaŭde, kiam ili partoprenis la festan Valamo-stilan vespermanĝon kaj ĝuis la programon kune kun la kursanoj.

Aliaj libertempaj programeroj dum la kursosemajno estis promenado al la kruco de la migranto kaj vizito al la monaĥeja tombejo. Merkredvespere grupo de kursanoj ekskursis al proksima fumsaŭno ĉe malnova arbarista loĝejo kaj ĵaŭde kelkaj el ili memstare vizitis la apudan Lintula-monaĥinejon.

Vendrede post la kursofino 10-persona grupo krozadis surŝipe el Heinavesi al Kuopio por tie partopreni la festivalon *Arta Lumo*. Bonega vetero akompanis ilin dum la 4-hora vojaĝo tra la belega lagojo.

Venontjare estos denove tempo reveni al Valamo. La kursosemajno okazos tre verŝajne fine de junio. Sekvu niajn informojn en www.esperanto.fi kaj venu ankaŭ vi.

Tiina Oittinen



Arta Lumo inter nordaj lagoj

Sian centjariĝon Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) festas ĉi-jare per tri ĉef-aranĝoj: printempa Jubilea Festo en Helsinko, somera festivalo *Arta Lumo* en Kuopio, kaj aŭtuna lingvopolitika simpozio en Vaasa.

La festivalo, kiun 27 jul – 1 aŭg gastigis la moderna kaj bone ekipita muzikcentro de Kuopio, celis montri la eblojn de Esperanto kiel arta lingvo. Ĉi tiun defion akceptis grupo da diversnaciaj artistoj, kiuj jam en la malfermo montris pecojn el la plenumotaj programoj.

Nature, en la muzikcentro muziko ĉefrolis. Juna kaliningrada kantistino Natalia Striĵnjova en sia koncerto *Feliĉa Mondo* ekskursigis la publikon tra la mondo per bele kantita pop-muziko en Esperanto kaj en kvar pliaj lingvoj. La mondvojaĝan stafeton reprenis la franca duopo *Duobla Unu* kun kantoj en 14 lingvoj (inkluzive de unu inventita de ili mem por unu el la kantoj) kaj dancoj.

Alispecan koncerton en la muzikcentra ĵazklubo prezentis Solo (Solotro-nik) el Andaluzio kun flamenkaj versioj de kantoj de *The Beatles* en elektromuzika prezento kun lumo kaj fumo. En la sama loko koncertis ankaŭ la finnlanda rokbanda *Dolchamar* rekantinta iom nove siajn malnovajn kantojn kaj danciginta la kunvenintojn.

Aliaj finnaj muzikistoj montris sian talenton. Koncertis gitargrupo *Haapis* sub la gvido de Vesa Pölkki. Esa Toivola improvizis himnojn per preĝeja orgeno. Timo Väänänen demonstris la preskaŭ senlimajn eblojn de la elektra kantelo, kiun li mem inventis, kaj kunlabore kun dancistino Päivi Järvinen en etoso fabela

En Kuopio kaliningrada popkantistino Natalia Striĵnjova faris sian unuafojan solkoncerton en Esperantujo (*Fotis AlKo*)

kaj magia sur la scenejo kreigis la vizaĝo de Väinämöinen el *Kalevala*.

Ne nur muziko. Markku Sarastamo havis ekspozicion kun bildoj, skulptaĵoj kaj rakontoj. Anja Karkiainen kante kaj poeme kelkfoje riĉigis la programon. Taneli Huuskonen palindromis... Filmoj estis spektblaj...

Probable neniu esperantista renkontiĝo malhavas prelegojn. *Arta Lumo* ne estis escepto — la redaktoro de *La Ondo* prelegis eĉ kvarfoje pri temoj kulturaj, tiel spronante intereson pri la libroservo kiu proponis ankaŭ la ĵus reeldonitan ĉefverkon de Tolkien. Kaj tiuj, kiuj ankoraŭ ne povas legi beletrajn verkojn, lernis la lingvon en la kurso de Atilio Orellana Rojas kaj lokaj instruistoj.

La ekskursata tago ebligis konatiĝi kun salikejo de esperantisto Kimmo Hakala en Vesanto, viziti bienon en Tautalampi kaj, neeviteble, ĝui tipan finnan saŭnon, post kiu oni riverborde piknikis, kantis, kaj ĝuis la serenon nordan naturon.

Libera tempo preskaŭ mankis, kaj la aŭtoro de ĉi tiuj linioj nur pene sukcesis eskapi el la festivalejo por viziti ortodoksan muzeon kaj supreniĝi al la skisaltejo en Puijo, de kies turo malfermiĝas majesta panoramo al la urbo, bele situanta inter lagoj, insuloj kaj arbaroj.

Ĉu do ĉio bona? Jes, la programo estis eĉ bonega, sed ĝi meritis oble pli grandan publikon. Nur sesdekda al esperantistoj el dek landoj venis al Kuopio por ĝui ĝin (kaj iom da lokanoj aĉetis koncertbiletojn, precipe por la kantela koncerto). Ĉi tiom da partoprenantoj ne sufiĉus por kovri la festivalajn kostojn, sed EAF sukcesis ricevi subvenciojn de la urbo Kuopio (la broŝuro kaj lunĉo), Pohjois-Savon rahasto (kultura fondaĵo de Norda Savonio), Fondumo Esperanto kaj Svenska kulturfonden (svedlingva kultura fondaĵo). Tiu lasta fondaĵo subtenos ankaŭ la oktobran simpozion en Vaasa.

AlKo

Ni havis en la festivalo *Arta Lumo* eksterlandajn gastojn, tamen ne multajn. Vin, kiuj ne ĉeestis, ni instigas peti la por la evento eldonitan turisman broŝuron *Kuopio poŝformate* de la urba turisma oficejo:

✉ Urbo Kuopio, Tulliportinkatu 31, FI-70100 Kuopio

📧 Tiedotusneuvonta.kka@kuopio.fi

Novaĵoj el la Esperanto-urbo

Dusemajna SALo

La duan fojon okazis la dulanda Somera Arbara Lernejo (SALo), kiu kunigas dum duona monato Esperanto-lernantajn infanojn inter 12 kaj 16 jaroj el la ĝemelurboj Góra (Pollando) kaj Herzberg — la Esperanto-urbo (Germanio). Ĉi-jare inter 28 jul kaj 11 aŭg ili interrilatis en la internacia lingvo en amika internacia etoso sub la gvido de geinstruistoj.

La gazetaro emfazis, ke ĉi-jara SALo karakteriziĝis per riĉa programo prizorgita de la Interkultura Centro Herzberg (ICH). La infanoj amuziĝis en glitejo kaj naĝejo, lernis arkopafi, dancis diverslandajn popoldancojn, vizitis bestoparkon, esploris groton, ekskursis al turismaj lokoj, koncertis en Esperanto kaj migradis en arbaro. Ne mankis instrua parto kaj fina ekzameno. Ĉiuj kostoj estis kovritaj de la du urboj, la Pol-Germana Junulara Fondaĵo kaj privataj sponsoroj.

Tre impresa estis la favoro de la urbestro, Gerhard Walter, kiu oficiale akceptis kaj regalis la gepartoprenantojn en la urbodomo, persone gvidis tablotenisan turniron (kaj eĉ ludis en ĝi kun la infanoj), disdonis pokalojn kaj donacojn, prezidis diversajn publikajn aranĝojn kaj plurfoje vizitis la kunvenojn.

Paroli, kanti kaj manĝi Esperante!

La lastan junian tagon granda grupo da homoj el Herzberg kaj el diversaj lokoj el Germanio, Belgio, Nederlando, Hispanio kaj Hungario gustumis la unuan Esperanto-salaton en la greka restoracio *Akropolis* en Herzberg.

La nova bongusta kreitaĵo konsistas el diversaj freŝaj verdaj salatelementoj kaj el kaprinoformaĝo. Sur la Esperanto-salato (vd pĝ. 26) troviĝas kvinpintaj steloj el verda papriko. Oni celebris la debutan Esperanto-salaton en gaja internacia rondo kun gazetaraj fotoj. Specialaj grekaj alkoholaĵoj dum la unika evento je bonfarto de la Esperanto-movado ne mankis.

Krome oni transdonis la kompletan version de la esperantlingva manĝokarto. Ĝin tradukis Dirk Bindmann el Zeitz. En la Esperanto-urbo Herzberg multaj restoracioj petas propran Esperanto-menuon kaj pli ol 20 restoracioj esperantlingvaj manĝokartojn.

Certe estas novaj spertoj, ke oni ne nur povas paroli kaj kanti en Esperanto, sed ankaŭ gustumi la novajn manĝakreaĵojn.

ICH



La nova ZEO en Herzberg tuj post la inaŭguro

Monumento al Esperanto-pioniro

Memormonumento honore al la Esperanto-pioniro Joachim Gießner estis solene inaŭgurita 30 jun 2007 en Herzberg.

Mintrajna vagoneto kun tabulo, sur kiu surestas dulingva etbiografio (vidu la supran foton) memorigas pri Joachim Gießner kaj lia 50-jara aktiva agado. Krome nova ŝildo malantaŭ la vagoneto bonvenigas la alvenintojn en “Herzberg — la Esperanto-urbo”.

La Herzberga fervojisto kaj estro de la fervoja stacidomo Gießner (1913–2003) dum multaj jaroj estis prezidanto de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), kaj de 1968 ĝis 1990 li estis prezidanto de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF). Li ankaŭ estas tre konata por lia ampleksa traduka laboro, ĉefe de ĉiusepacaj kantoj.

La solenan inaŭguron ĉeestis inter aliaj: la urbestro de Herzberg Gerhard Walter, la prezidanto de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) Achim Meinel, s-ro Patzold de la sociala fervojista fondaĵo *Stiftung Bahn-Sozialwerk*, Ulrich Mattke kiel muzikisto kaj amiko de Joachim Gießner — kiu festparolis pri la elstara traduklaboro far Joachim Gießner rilate al kantoj en Esperanto, GEFA-prezidinto Rolf Terjung (kiu kolektis la mondonacojn de la membroj de GEFA kaj IFEF por la monumento).

Thomas Sandner

Kaliningrado jubileas

17 aŭg 2007 en la Germana-Rusa Domo en Kaliningrado, reprezentantoj de la regionaj kaj diplomaciaj instancoj, sociaj kaj fakaj organizaĵoj, ĵurnalistoj festis kune kun esperantistoj la

centjariĝon de la organizita movado en Kenigsbergo-Kaliningrado.

La prezidanto de la regiona esperantista societo, Halina Gorecka, konci-ze prezentis la historion de la urba movado, kiu komenciĝis somere 1907, kiam Adolf Ebner kaj Paul Fast kunfondis la unuan Esperanto-grupon en Kenigsbergo. Povilas Jegorovas kaj Daniela Emler salutis kaj gratulis la jubileantojn nome de la Esperanto-asocioj de Litovio kaj Pollando. Sekvis legado de kelkaj el la multaj ricevitaj salutmesaĝoj.

“Pli ofte ni ŝatus ankaŭ persone kunesti inter Rusaj kaj Germanaj samideanoj, — skribis d-ro Rudolf Fischer, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, kies subteno ebligis aranĝi ĉi tiun festkunvenon en unu el la plej prestiĝaj kunvenejoj de la urbo. — Tiurilate bremsas niajn vizitojn malmalmodernaj reguloj pri vizitoj kaj pasportoj, kaj ni petu insiste niajn ŝtatajn instancojn forigi tiujn barierojn inter bonvolaj homoj. Esti Esperantisto devas sufiĉi kiel pasporto al la koro de la translimaj najbaroj”.

Simile esprimis sin kelkaj aliaj salutintoj, kiuj ne povis veni pro la nova viza reĝimo (legu la vortojn de Osmo Buller en la paĝo 19). Tamen iom da kritikaj atentigoj ne ombris la festan etoson, kiun kunkreis multaj bondeziroj, kanta gratulo de Natalia Strijņjova, enmanigo de dankletoj (ricevis ilin ĵurnalistino Irina Klimoviĉ kaj loka aktivulo Nikolaj Penĉukov), sprita parolado de la sekretario de la regiona socia ĉambro Oleg Turuŝev, kaj fine bufeda regalo.

La Esperanto-jubileo tiuvespere diskoniĝis en la urbo kaj regiono, ĉar du televido raportis pri ĝi.

AIKO

Por korpa kaj mensa aktivado

La Sandecian Semajnon organizis Filio de PEA en Nowy Sącz, en la sud-orienta Pollando. Ni elektis en junio la montaran vilaĝon Rytro inter du montaraj ĉenoj de Sandecia Beskido.

Ni planis turismi en la montaro: migri tra montaj itineroj, flosi laŭ la rivero Poprado, ekskursi al Slovakaj Tatroj por viziti tie submontajn kavernojn, akvofalon, intermontaran lagon.

Sed krom tiu korpa aktivado, ni ankaŭ volis dum ĉiu vespero iomete cerbumi, diskuti kaj ekzerci metodojn de lingva instruado, paroli pri inter-regiona kunlaboro, plani estontajn aranĝojn, ĝui la Esperanto-etoson...

Bonŝance krom la esperantistoj ĉeestis kvar personoj el Universitato de la Tria Aĝo (UTA), kiuj nenion sciis pri la lingvo kaj tute ne planis ion lerni dum tiu ĉi semajno. La eksperimento povis esti eĉ triobla:

— konvinki la homojn pri lernado de Esperanto;

— per interesa instrumentado, allogi ilin al kontinuo de la komencita “feria” lernado;

— venigi ilin al la Esperanto-kursoj en iliaj UTA-oj, kaj samtempe kunligi la kontaktojn kun lokaj E-organizaĵoj, por ricevi helpon de instruistoj kaj ĉeesti en la kluba agado.

Ni serĉis konfirmon de la tezo, ke multaj homoj eklernus Esperanton, se ni montrus ties facilecon kaj agrable komencus instruadon. Pretis plenumi tiun taskon Stanisław Mandrak, kiu ĵus eldonis polan version de la lernolibro de Stano Marček *Esperanto per rekta metodo*. Li venis al Rytro kun novaj libroj, diskoj, desegnaĵoj, kaj dum kvar tagoj gvidis la kurson dufoje po 45 minutoj ĉiutage.

Ni, spertuloj, instigis tiujn kvar personojn eklerni, kaj observis la lecionojn, komparis ilin kun la prezentita metodo de niaj Sandeciaj instruistoj Danuta Kowalska kaj Jolanta Kieres, kiuj venis kun niaj kursanoj — komencantoj el Nowy Sącz.

Jam dum la unua tago la novuloj ekkonis preskaŭ 50 vortojn kaj sukcesis respondi demandojn de la instruisto! Post la forveturo de Mandrak, kiuj faris sep lecionojn, la instruadon daŭrigis Lidia Ligeża el Krakovo, memorigante al la kursanoj la antaŭajn lecionojn, kaj riĉigante ilian vortprovizon.

Dum la tuta aranĝo regis preskaŭ familia etoso, kaj ni facile interamikigis.

Halina Komar



Reprezentantoj de AIS (Prof Quednau), de la urbo (vicurbestro Jan Matuszek), kaj de NATO (generalo Bolesław Izydorczyk) en Cieszyn (Fotis Małgorzata Wesolowska)

AIS-sesio + Festivalo en Cieszyn

La programo de la dua Pola Filmfestivalo, kiu okazis meze de julio en Cieszyn, enhavis prelegon pri sufera historio de homoj, kiuj naskiĝis dum milito, sed dank’ al Esperanto lernis denove kredi al paco, justeco, toleremo kaj amikeco.

Ĉi tiun ideon subtenis la urbestro de Cieszyn Bogdan Ficek kaj generalo de NATO Bolesław Izydorczyk. La urbestro kaj la vicurbestro ĉeestis la malfermon de la 2a Silezia Studadsesio de AIS, kiu okazis en Cieszyn samtempe kun la Filmfestivalo.

La sesion inaŭguris parolado de generalo Izydorczyk pri NATO kaj ties rolo en la nova Eŭropo. Poste en solena etoso okazis transdono de rubando-mesaĝo de esperantisto Jerzy Walaszek (polo, naskiĝinta dum la dua mondmilito en porinfana koncentrejo en Linz) al junaj poloj kaj albanoj. Walaszek prezentis filmon pri tiu periodo kaj rakontis pri sia vivo. Albanaj junuloj kun larmoj en la okuloj parolis pri la tragedio en Albanio.

Ke espero kaj nova vivo estas kaj estos, montris ekspozicio *Fiereco de Silezio*, kiu rakontis pri la vivo de junuloj en la Eŭropa Unio kun emfazo de la silezidevena futbalisto Łukasz Podolski el la teamo *Bayern* (Munkeno). Por junuloj li simbolas novan periodon — dum kiu oni povas batali kaj venki pere de sporto.

En kaj ekster la kadro de la Studadsesio okazis pluraj kursoj kaj lekcioj fakaj, prilingvaj kaj ĝeneral-klerigaj, kiujn prezentis docentoj de AIS kaj invititaj gastoj de Pola E-Asocio kaj FAM (Filma Akademio). Inter la aŭskultantoj estis ankaŭ studentoj de FAM kaj de Filio de Silezia Universitato en Cieszyn. La programon kompletigis ekskursoj.

Alicja Lewanderska

Somera kurso en Afriko

Fine de julio okazis sestaga Esperanto-kurso en la Instituto Zamenhof en Togolando. Inter 65 aliĝintoj estis 10 progresantoj, 20 personoj kiuj iam lernis Esperanton, kaj 35 komencantoj. La kurson, kies objektoj estis gramatiko, kulturaj konoj, aŭskulta kaj tekstata kompreno, metodiko kaj eseo gvidis Doumegnon Koffi, Attaglo Elom Markus Eviegneame kaj Agbolo Apélété Didier.

Por subteni kaj kuraĝigi la gelernantojn, TIETTo okazigis tagmezan kunmanĝon ĉiutage.

Por la antaŭtesto, 9 el tiuj personoj, kiuj iam eklernis Esperanton, sed ne sukcesis la Zagreb-metodan ekzamenon, aliĝis al la komencantoj. La rezulto de la antaŭtesto (diktaĵo por la komencantoj kaj personoj kiuj iam lernis Esperanton, kaj gramatikaĵo por progresantoj = elementnivela ekzameno de ILEI/UEA) estis jena:

— Komencantoj: 20 sukcesis el 35 anstataŭ 44 (8 ne prezentiĝis por la antaŭtesto).

— Personoj, kiuj iam lernis Esperanton kaj havas la Zagreb-metodan diplomon, sed multon forgesis: 10 el 11 sukcesis.

— Progresantoj: 8 el 10 sukcesis.

La sukcesintoj prezentiĝis por la ekzameno. Ĝin sukcesis 16 el 20 komencantoj. Pri la elementa ekzameno de ILEI/UEA la fina rezulto dependos de la kompetentaj instancoj de ILEI/UEA.

Por ke la gelernantoj ne forgesu la lingvon, estas decidite organizi ĉiusabatan kurson je kvar niveloj.

Agbolo Apélété Didier

28 jul 2007 post longa suferado forpasis

Mihály Gergely (1921–2007)

renomata hungara verkisto, aŭtoro de pli ol 70 libroj, laŭreato de multaj premioj, dekoraciita per ŝtataj ordenoj kaj medaloj. Esperantisto ekde 1963, li estis prezidanto de HEA (1966–77, 1986–89); redaktis *Hungaran Vivon* kaj la hungarlingvan gazeton *Eszperantó Magazin* (poste: *Világ és Nyelv* = Mondo kaj Lingvo).

12 aŭg en Portadown (Norda Irlando) post longa elĉerpa malsano forpasis

Marvin H. Stanley (1953–2007)

ekonomikisto, bibliotekisto kaj informadikisto. Ekde septembro 1986 li laboris en la Centra Oficejo de UEA kiel ĉefkontististo. Dum multaj jaroj li gvidis ankaŭ la agadon de *Espermenso*.

Kroatio: nafta kompanio finansas

Kroata Nacia Nafta Kompanio INA akceptis financi du projektojn de Kroata Esperanto-Ligo rilatantaj al Azio.

INA financis la kulturen programon de UK en Jokohamo per 1400 eŭroj. Ĉi tiun sumon ricevis juna muzikistino Kaja Farszky por kontribui al la muzika programo de UK en Jokohamo. Kaja koncertas per marimbo, instrumento kiun ŝi studas en Muzika Akademio de Zagrebo.

Krome, INA helpas eldoni kroatan libron en la vjetnama traduko. La infanlibro *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapiĉ* de Ivana Brlić-Mažuranić estis tradukita de vjetnama teamo gvidita de Nguyen Xuan Thu.

La nafta kompanio elektis tiujn du projektojn inter multaj aliaj, kiuj anonciĝis por la subteno. Tio estas rekono ne nur al Kroata Esperanto-Ligo sed al Esperanto ĝenerale.

Spomenka Štimec



Kaja Farszky

Bonzo Miaohui estas sufiĉe konata en la ĉina Esperanto-movado. El la templo li rete instruas Esperanton, aktivigas homojn, konsilas kaj kuraĝigas la esperantistojn. Li estas tradukinto el la ĉina lingvo al Esperanto de granda kvanto da budhisma literaturo.

Augusto Casquero

Ĉinio: kurso en budhisma templo

24 jun okazis en la budhisma templo Duobao en la urbo Sanmen (orienta Ĉinio), seminario-kurso pri la didaktiko de Esperanto. Ĝi konsistis el du klasoj, po du horoj, por budhismaj bonzoj kaj aliaj ĉeestantoj, kun ĉeesto de Miaohui, bonzo de tiu templo, organizanto de la seminario, kaj profesoroj de Esperanto He Benfa kaj Liu Baoguo. La gvidanto de la seminario estis Augusto Casquero, kiu unuafoje en sia vivo instruis nudpiede.

La sperto estis ege interesa kaj pozitiva. La ĉeestantoj aktive partoprenis la klasojn, kun granda intereso. Ili petis ripeti tiun seminarion en alia tempo, sed pli longe, por bone lerni la teknikojn de la instruado de Esperanto. La bonzoj ĉeestantaj vere diligente lernis, kaj kun granda intereso partoprenis.

Brazilo: trafa propagando

23 jul okazis en la brazila urbo Niterói festo pri la 90-jariĝo de Academia Fluminense de Letras (Beletra Akademio de Ŝtato Rio de Janeiro).

La Prezidanto de la Akademio, Edmo Rodrigues Lutterbach, festparolis kaj disdonis memormedalojn al pluraj akademioj kaj institucioj. Inter ili troviĝis Kultura Kooperativo de Esperantistoj, reprezentita de ĝia prezidanto, Givanildo Ramos Costa, kaj Niterói Esperanto-Klubo, reprezentita de ĝia prezidanto, Walter Fontes.

Poste okazis plurlingva recitalo de Neide Barros Rêgo. Ŝi kantis en la latina, angla, portugala, rusa, hispana, franca, germana, itala kaj en Esperanto. Jen trafa propagando pri la internacia lingvo ĉe neesperantista publiko!

Aloísio Sartorato

Japanio: ne nur UK en Jokohamo

Pli ol cent esperantistoj el Kantoo-regiono, konsistanta el Tokio kaj la ĉirkaŭaj gubernioj, kolektiĝis en sia 56a Kongreso okazinta 20 maj 2007 en Jokohamo.

La programo enhavis, interalie, tri libro-temajn prelegojn:

Hori Yasuo, kiu eldonis sian dekan libron en la serio *Raportoj el Japanio*, parolis pri la transiro de la japana socio dum la pasintaj 10 jaroj. Usui Hiroyuki, kiu ĵus eldonis libron kun siaj japanaj tradukoj de elektitaj poemoj de William Auld, parolis pri lia vivo, poemoj kaj pri sia vizito al lia hejmurbo. Sergej Anikeev, estro de Hakodate-branĉo de Ruslanda Ekstremnorda Universitato, rakontis pri la rusa poeto Eroŝenko, kiu vivis en Japanio antaŭ 90 jaroj, doninte grandan influon al la japana kultura mondo.

Poste ni promenis al la estonta UK-kongresejo *Pacifiko Jokohamo*.

Hori Yasuo

Kostariko: kursfina ekspozicio

Ekde la unua semajno de marto ĝis la lasta semajno de junio 20 gestudentoj studis Esperanton en la baza kurso ĉe Universitato de Kostariko. Temas pri semestra, elektelebla oficiala kurso alirebla por studentoj en ĉiuj studprogramoj je la bakalaŭra nivelo. Ĝi valoras tri akademi-unuojn. La kurson oni ofertas jam dum ok jaroj.

La celoj de la kurso estas informi pri la realeco de Esperantio kaj kapabligi la studentojn traduki tekstojn el Esperanto al la hispana lingvo.

Studentoj ricevis multajn bildkartojn el multaj landoj, interalie, danke al la anonco en *La Ondo de Esperanto*. Fine de la kurso, oni pretigis ekspozicion per ĉiuj bildkartoj ricevitaj.

Hugo Mora Poltronieri

Ni ne povas raporti pri ĉiuj Esperanto-kursoj, nur pri la plej interesaj, ekzemple pri tiuj en Duobao (maldekstre) kaj Kostariko (dekstre).



Sun-Diego – nova hejmo de NASK

Saluton, legantaro,
el ĉiu land' de l' mondo,
kiu avide frandas novaĵojn el la Ondo,
foliumante paĝojn, aŭ per la reto ŝute
ĝuante la revuon —

mi kantas vin salute!

Pardonpeton al ĉiuj poeziamantoj!
Malgraŭ tio, ke pluraj tagoj jam pasis
post NASK (la Nord-Amerika Somera
Kursaro de Esperanto), enmense min
ankoraŭ ravas la sonoraj strofoj de *La
Infana Raso*, tiu fama epopeo de
William Auld.

Auld estis ne nur elstara verkisto,
sed ankaŭ la unua kaj ĉefa instruisto en
NASK ekde ĝia komenco en 1970.
Omaĝe al lia memoro, ĉi-jaraj instru-
istoj Lee Miller kaj Paul Gubbins parte
temigis la kursaron pri liaj vivo kaj
verkaro. Dum tri semajnoj oni povas
nur supraĵe ekkoni tiun verkaregon,
sed al mi la gustumo sufiĉis por vekti
Auld-manion!

Ĉi-jare la kursaro translokiĝis de
orienta Usono al la prestiĝa Universi-
tato de Kalifornio en San-Diego
(UCSD), kie la belegaj plaĝoj kaj per-
fekta vetero sendube helpis sukcesigi
la etoson.

Partoprenis 24 lernantoj el Usono,
Kanado, Germanio, Japanio, Makedo-
nio kaj Irano kun diversaj aĝoj, vid-
punktoj, kaj vivspertoj. Ni multe profi-
tis de la ĉeesto kaj helpo de spertaj
esperantistoj el la urbo kaj la universi-
tato mem, kiuj ĉiĉeronis, ŝoforis, kaj eĉ
regalis nin dum multaj ekskursoj post
la matenaj klasoj.

Prezentojn kaj ekskursojn gvidis
ankaŭ lernantoj. En posttagmezaĵ pro-
gramoj oni povus sciigi pri kanadaj
pentristoj, lerni pri veganismo aŭ
moderna arkitekturo, verki poemojn,
promeni tra parkoj, bretludi, salsa-
danci, aŭ eĉ serĉi trezoron helpe de
persatelita lokalizilo! Aperis en ĉiu-
taga novaĵbulteno *La NASKa Fasko*
diversspecaj artikoloj fare de lernantoj;
eĉ aperis serio de ampoemoj verkitaj
de mistera, kaŝnomita majstro.

Pro la belega loko kaj la helpemaj
lokaj esperantistoj, ŝajnas ke San-Die-
go restos nova hejmo por NASK. Laŭ
prof. Gubbins, eĉ la urbonomo estas
taŭga — sed tamen iomete misliteru-
mita. Efektive, ĉe la universitata tereno
troveblas granda skulptaĵo nomita
“sun-dio”. Mi ege volas reveni venont-
jare por denove adori tiun Sun-Diegon
en bela San-Diega Esperantio!

Pli da informoj ĉe: <http://esperanto.org/nask>. Stipendioj haveblas.

Hoss Firooznia



Sun-Diego en San-Diego (Hoss Firooznia)

Popola korespondanto

La festado de la 120-jariĝo de
Esperanto estis aranĝita en Karaganda
(Kazaĥstano) 27 jul ĉe la monumento
Eterna fajro. Sur la asfalto estis skrib-
itaj la vortoj “Saluton”, “120 jaroj de
Esperanto”.

Televideo ART filmis la rakonton
pri Esperanto. La ĵurnalistino estis
instruita saluti, amiki, ami kaj adiaŭi
en Esperanto. Ŝi ricevis flugfolion pri
la 120-jariĝo de Esperanto, kaj la dua
estis forflugita en ĉielon kun verda
baloneto. ART montris la priesperan-
tan programon dufoje.

La solenadon organizis Viktor
Kurilov. ART sabate invitis lin en sian
studion kaj enmanigis al li la honoran
folion “Popola korespondanto” kaj
montris lin en la *Semajna resumo*.

Vera Matvejeva



Brazila radioprogramo 30-jara

Radio Rio de Janeiro elsendas ĉiu-
dimanĉe la programon *Evangelio-Spi-
ritismo-Esperanto*. Prezentata de
Elmir dos Santos Lima (*vidu la foton*),
ĝi estas parolata dulingve (Esperante
kaj portugale). En 2007 ĝi 30-jariĝas.

Laŭ la radioparolisto, la celo de la
programo estas disvastigi Esperanton
en la spiritisma komunumo kaj spiriti-
smon en la esperantista movado. La
frekvenco estas 1400 kHz (mezaj
ondoj). *Evangelio-Spiritismo-Esper-
anto* estas elsendata je 19h00 laŭ la
brazila tempo (je 22h00 UTC). Rete
oni povas aŭskulti ĉe <http://www.radioriodejaneiro.am.br>.

Salutmesaĝojn sendu rete al
linguadafraternidade@bol.com.br

Fabiano Henrique

Kvaronjarcenta Espero

Neimageble, tamen vere! Unuper-
sona Esperanto-teatro *Espero* de Jerzy
Fornal en Varsovio funkcias jam 25
jarojn. Dum tiu periodo TEV prezentis
17 monodramojn en Pollando, kie ĝi
fondiĝis en 1982, sed ankaŭ en pluraj
landoj de Eŭropo, en Argentino, Brazi-
lo, Israelo, Japanio kaj Sovetunio.

La repertuaro de la teatro estas tre
vasta. En kelkaj teatraĵoj la aktoro per-
sonigas grandajn artistojn kaj scienci-
stojn kiel Zamenhof, Mozart, Einstein,
Grabowski. En aliaj li spegulas gravajn
soci-historiajn eventojn, kiel epok-
ŝanĝajn revoluciojn, kaj aliajn esence
gravajn soci-ekologiajn problemojn.
Kelkaj traktas la Esperanto-komu-
naron, laŭ satire “oblikva spegulo”.
Aliaj ĝojigas per varieteaj prezentoj. Ili
estas bazitaj je prozo, poezio tradukitaj
al Esperanto el diversaj lingvoj, sed
ankaŭ je originalaĵoj esperantaj. Ĉiuj
inkluzivas pantomiman arton kaj kon-
forman valoran muzikon.

La gamo de verkistoj, je kies verkoj
baziĝas la spektakloj, estas tre varia.
La temaro de monodramoj ĉiam enha-
vas iun mesaĝon, vehiklas sociajn pro-
blemojn akordajn al idearo de Esperan-
to, kiel batalo por paco kaj justo.

Dum sia kvaronjarcenta aktivado
teatro *Espero* prezentis centojn da
spektakloj. La teatron gvidas Zofia
Banet-Fornalowa, kiu antaŭas ĉiun
spektaklon per konforma prelego.

Bedaŭrinde pro diversaj kaŭzoj pri-
movadaj kaj ĝenerale dirite civilizaj la
tempoj ne estas favoraj al Esperanto-
teatro. Mankas sufiĉa apogo flanke de
la Movado kaj de ŝtataj instancoj. La
publiko ĉiam pli ŝrumpiĝas. Mankas
volontuloj por daŭrigo de teatra kultu-
ro. Malgraŭ tio ne eblas forlasi aretojn
de fidelaj teatroŝatantoj. Tion konsi-
derante la teatro *Espero*, apogata de sia
gastiganto Andrzej Wawrzyniak, en
junaĝo fervora esperantisto, kaj ankaŭ
de la amika personaro de Artgalerio
Nusantara kun estro Marian Majka
surfronte, decidis daŭrigi la aktivadon.

3 sep TEV intencas lanĉi laŭvican
26an sezonon. Ĉiuj esperantistoj pre-
terpasantaj Varsovion estas elkore
invititaj viziti la teatron. La spektakloj
okazas ĉiun unuan lundon de l' monato
je 17h00. La antaŭanta prelego estas
aŭdigata je la 16h00.

HeKo





Survoje al Jokohamo

27 jul 2007 survoje al la 92a Universala Kongreso (Jokohamo) en la for-orientan ruslandan urbon Vladivostoko alvenis Esperanto-grupo gvide de Tatjana Loskutova. Ĝi konsistis el 22 homoj — 17 el Francio, po 2 el Nederlando kaj el Ruslando, 1 el Italio.

Okazis interkona vespero, busaj kaj perpiedaj ekskursoj tra la urbo kaj ties ĉirkaŭaĵoj k.a. La restado en Vladivostoko koincidis kun la Mararmea festo dum kiu la vizitintoj ĝuis la etoson akompane de la lokaj esperantistoj. 30 jul la karavano ŝipe forveturis al Japanio.

La akceptadon helpis la Regiona Packomitato, Urba Administrejo, For-orienta Ŝtata Teknika Universitato kaj Regiona muzeo Arsenjev. La regionaj ĵurnalo *Vladivostok* kaj agentejo RIA-Novosti informis pri la vizito.

Aleksandr Titajev

Esperanto venkis Manĉestron

1 jul en Rumonge (Burundio) okazis futbala matĉo inter la lokaj teamoj *Esperanto FC* kaj *Manchester*. La ludo estis ege interesa, kaj la esperantista teamo bone ludis kaj gajnis per 1 golo kontraŭ 0.

Nun en Rumonge ĉiuj esperantistoj estas ege kontentaj, ĉar *Manchester* estis la unua en Rumonge. Laŭ la trejnistoj Mateso Rashidi, nia juna teamo estas forta kaj neniuj loka teamo venkos ĝin. Laŭ li, nur ni disponigu por ili sufiĉan materialon (ŝuoj kaj aliaj futbalaĵoj) kaj ankaŭ subtenu ilin morale. “Nia teamo ne plu estas infano kaj povas eĉ partopreni internacian aranĝon, mi petas al vi ĉiuj subteni donacante eĉ malnovajn piedpilkajn aŭ aliajn futbalaĵojn”, — li aldonis.

Nome de ANEB (Asociation

Nationale pour l'Espéranto au Burundi) ni promesis ke ni klopodos havigi al ili kelkajn necesajojn kaj morale ni estos kun ili. La teamo celas informadi per sporto, kaj nun en Rumonge multaj scias, kio estas Esperanto.

Subtenu la teamon *Esperanto*:

✉ ANEB, c/o Sabiyumva Jérémie
BP 170 Rumonge Burundi

✉ jerrybs21@yahoo.fr

Sabiyumva Jérémie

Per jakto al fina venko

[Ret-info] La nomo *Esperanto* por ĉiam eniris en la kronikon de la berlina akvosporto. En konkurso pri Oberhavel-pokalo, kiu okazis 23 jun 2007, la teamo de la motorjakto *Esperanto* atingis la unuan rangon kaj hejmenportis pompan premiovazon kaj diplomon.

La tri ŝipanoj ne nur brile kaj precize plenumis elementajn navigajn taskojn, sed ankaŭ pruvis profundajn sciojn pri la akvo-distrikto inter Tegel, Niederneuen-dorf kaj la lago de Spandau. Krome ili montris siajn sperton kaj scipovon sur la Odra-Havela Akvo-vojo kaj ĝenerale sur la kampo de la enlanda navigado en Germanio. La jakton estris ties posedanto Gabriela Schnell. Subtenis ŝin, partoprenante en la plenumado de diversaj taskoj, Roland Schnell kaj Lu Wunsch-Rolshoven.

La hejma haveno de la jakto situas sur la tereno de Motor Yacht-Club Tegel (MYCT). De tie ĝi regule startas al veturoj tra la akvoj de Berlino kaj Brandenburgio. Je la demando “Ĉu vi parolas la lingvon, sub kies nomo veturas via ŝipo?” la teamanoj povas respondi sen hezito: “Jes, kompreneble”.

Roland Schnell

Unufraze

★ Vjetnama Unio de Organizoj por Amikeco donis 1 aŭg 2007 la insignon *Por paco kaj amikeco inter la popoloj* al Renato Corsetti. (HeKo)

★ Okaze de la centjariĝo de la Bulgara E-Asocio, festita 1 jun en Karlovo, la Bulgara Poŝto eldonis specialan koverton kun unuataga stampo. (*Heroldo de Esperanto*)

★ La urbeŝtraro de Moutiers-les-Mauxfaits (Vendeo, Francio) unuanime decidis doni la nomon *Esperanto* al 50-doma strato en la parceligita konstrutereno Hameau du Bois. (*La Sago*)

★ Lastatempe Eo estis diversmaniere prezentita en Katalunio: stendoj en Festo de Diverseco en Sabadell k en Ekspozicio de la anarkiisma libro en Valencio, E-ekspozicio en la centra biblioteko de Terrassa, prelegoj pri Eo en kelkaj katalunaj mezlernejoj k en la Barcelona Universitato; librovendejo *Alibri* (Barcelono) fondis E-fakon. (*Kataluna Esperantisto*)

★ Kuba E-Asocio okazigis en junio la unuan kuban Ago-Tagon kun ekspozicioj, prelegoj, koncertoj, informaranĝoj ktp en Santiago de Kubo, Sancti Spiritus, Havano k aliloke; pluraj landaj, regionaj k lokaj amaskomunikiloj raportis pri Eo. (Landa Agado)

★ D-ro Jouko Lindstedt prelegis en junio pri *Eo – ĉu orienteŭropa kontaktlingvo* en internacia konferenco “La eŭropeco de slavaj lingvoj kaj kulturoj aŭ la slaveco de Eŭropo” en la Slavistika Instituto de Humboldt-Universitato en Berlino. (*Informilo por interlingvistoj*)

★ Asocio *Espéranto-Genève-Régions* organizis E-standon en la ĝeneva librofoiro. (*SES Informas*)

★ La OSIEK-premio 2007 estas atribuita al Ĵak Le Puil k Armelle LeQuint pro la traduko de *Vojaĝo ĝis noktofino* de Céline. (*Heroldo de Esperanto*)

★ JEB (Junularo E-ista Brita) denove iĝis junulara fako de la E-Asocio de Britio; nun ĉiuj EABanoj malpli ol 30-jaraj membras en JEB. (*EAB Update*)

★ Progresas la verkado de la 500-paĝa *Historio de la esperanta literaturo* fare de Carlo Minnaja k Giorgio Silber, eldonota de LF-koop samtempe kun antologioj proza k poezia. (HeKo)

★ La prezidantaro de Serbia E-Ligo decidis, ke la unua Kongreso de Serbiaj E-istoj okazos 1–4 maj 2008 en Niŝ kun protektado de la urbestro. (Dimitrije Janičič)

Nerezignebla renovigo

“Kiam mortas papo fariĝas alia papo”, — oni diras en la itala por signi ke estas ĉiam la sama historio, nenio ŝanĝiĝas iam. Tamen ofte estas nepre necesaj kelkaj modifoj de gvidlinioj, se oni volas eviti stagnadon, kaj tio estas la kazo de la transdono de la torĉo en la gvido de UEA, ĉar la bezono de renovigo ŝajnas esti urĝa.

Eĉ la eklezio, spite al la popola diro, kiam ĉesas papeco, streĉe faras sian eblon por renoviĝi, kaj se la papo estis doktrineca, distancema, ekzemple, oni serĉas la novan liberalan, popularan.

Ni aŭdis multajn belajn vortojn de la ĉesinta prezidanto; li predikis plurfoje pri solidareco, frateco, tutmonda paco, homa interhelpo kaj aŭspiciis ke Esperanto malfermiĝu al la mondo, vokata ludi pontan rolon inter kontinentoj, kaj ke la ĉefa celo de Esperanto estas plibonigi la mondon. Renato Corsetti, petita de la redakcio de *La Ondo*, kiu intervjuis lin en la julia numero, doni konsilon al nova prezidanto diris: “daŭrigu esence laŭ la instruoj kaj la ekzemplo de Zamenhof”. Do neniun renovigo. Alia prezidanto predikanta la bonon de la homaro, oldamikaj renkontiĝoj, ĉirkaŭbrakoj kiel kutime.

Oni devus minimume kalkuli ke por esti konsiderataj je nivelo ludi iun pontan rolon ni ne povas esti tro malmultaj (“kvar katoj”, — la italoj diras) kaj devus neimageble multobliĝi, fariĝi granda armeo, vera popolo kaj esti valoraj ne nur kvante sed ankaŭ kvalite kun multaj talentaj homoj.

La frateco kaj paco de Renato Corsetti, kiun ni laŭdas kaj dankas tutkore pro la instruoj, estis ĝis hodiaŭ la forto de Esperanto sed la tempoj ŝanĝiĝis kaj tiuj sentoj povas fariĝi nun malforto, malhelpo al evoluo, al multobliĝo por ludi la rolon aŭspiciitan de Renato. Almenaŭ la realo estas tia: multaj predikoj, stagnado de la membroj. Kaj tiuj predikoj pri lingvo de la paco kaj simile alportas al movado homojn, kiuj mem estas malhelpo al disvastigo de la lingvo (se estus la malo ni ĝojus kaj ne ekzistus la problemo pri neevoluo). Se oni donas al movado stampon preskaŭ mesian, sektecan, altiritaj estas bedaŭrinde plejparte fanatikaj homoj.

Estas tempo, urĝa tempo, laŭ mi ke post belaj vortoj sekvu belaj agoj.



«La situacio estas malfacila, sed daŭrigu esence laŭ la instruoj kaj la ekzemplo de Zamenhof, kiu estis pli granda revoluciulo ol ni, kvankam li ne konis la distingon inter “linux” kaj “unix”. Tio ne estas grava. Gravas la celoj de la agado.» (Renato Corsetti, *La Ondo de Esperanto*, 2007, №7).

Renato senĉese ĉieestanta plej atente sekvas ĉiujn movojn de retaj grupoj, forflugas de listo al listo, lasante sian stampon ĉie, puŝeton ĉi tie kaj puŝeton tie, sed laŭŝajne neniam veran puŝon decidan pri nova iniciato. Sed predikanto nur mirakle fariĝas realiganto.

Iniciatoj por disvastigi la lingvon al entreprenema persono certe ne mankas, kaj ankaŭ mi povas sugesti kelkajn kiel la Trasiberia Esperanto-Vagonaro, kiun mi ne sukcesis komprenigi al iu respondeculo ricevante nekredablajn objetojn, ĉar neniun komprenis ke temis pri mesaĝo grandskala ke ekzistas lingvo, kiun oni povas lerni vojaĝante al kongreso, kiel Esperanto sub Ombrelego, organizado de kursoj sur la plaĝoj de landoj kun milionoj de banantoj kaj similaj.

Renato diras, ke oni devas plibonigi la mondon per Esperanto. Ni komencu helpante la homojn plibonigi sian vivon. Ni kreu la bezonon de internaciaj rilatoj kaj de Esperanto en la senfina serio de profesiaj kaj amatoraj asocioj. Mi spertis tion, kiam antaŭ kelkaj jaroj mi proponis al ĝenerala direktoro de itala poŝta libertempa organizo (180 mil membroj!) rapidan kurson de Esperanto por leterportistoj en pluraj landoj kaj grandan amaskunvenon ĉe la fino de la kurso. La

direktoro estis tre entuziasma kaj preta financi la aranĝojn kaj disponigi homojn kaj rimedojn. La respondo, kiun mi ricevis de la movado, estis bedaŭrinde senkuraĝiga kvankam ĝia engaĝo estus minimuma.

UEA stimulu per specialaj agadoj kaj per personoj aparte kleraj kaj kapablaj interesiĝon al Esperanto de politikaj partioj, lingvo-defendaj asocioj, porpacaj, medioprotektaj, kulturaj movadoj kaj lernejoj institutoj, por ke ili prenu iniciatojn favorajn al Esperanto. Estas pli kredebla, ekzemple, lingvodefenda asocio kiu parolas pri Esperanto ol Esperanto-asocio kiu parolas pri lingvodefendo.

Oni starigu kun la landaj sekcioj kontaktpunktojn, kie oni povas ricevi praktike kaj sen predikoj informmaterialon kaj lernolibrojn. Esperantistoj estu konsiderataj ne mesiistoj sed interkulturaj perantoj, kiuj havas reton internacian de kunlaborantoj. Potenciĝi la servojn de la movado kiuj estas *Pasporta Servo* (kial ne kunlabori kun aliaj pli fortaj asocioj similaj kiel *SERVAS?*) kaj la Delegita Reto kaj laŭeble aktivigi ĉiujn anojn de UEA listigante ilin en la jarlibro.

Tamen por renovigi estas necese ŝanĝi iomete ankaŭ la aliron al Esperanto. Malpli da retoriko, malpli da politika engaĝiteco, kiuj altiras fideismajn personojn, kiuj estas ofte ĝuste tiuj, kiuj malhelpas disvastigon de la lingvo kaj estas la kaŭzo kial en multaj lokoj esperantistoj estas rigardataj kiel zombioj. Sed ne temas pri elpurigado. Oni simple ŝanĝu muzikon. Oni alcelu la normalan homon. Kiam vi lanĉas la mesaĝon, ke Esperanto estas la lingvo de la paco (kiel tekstas en multaj niaj informiloj), ĉu oni povas atendi ke ni konvinkas amasojn al lernado de la lingvo? Tiel fakte ne estas.

Kiu estas la valoro de tiu mesaĝo, certe ne ke kiu lernas Esperanton atingas aŭ helpas pacon. Verŝajne kelkan sukceson vi povas ricevi sed, kiel dirite kaj kiel oni konstatas, tre limigite kaj en kelkaj specialaj tipoj de medioj. Sed certe ne en amaso de normalaj, ĉiutagaj familiaj homoj. Kiam inverse vi parolas pri Esperanto kiel lingvo de amikeco, vi parolas pri io atingebla kaj interesa por ĉiuj. Unu el la plej grandaj ĉagrenoj de niaj tempoj estas soleco. Oni vivas pli longe, oni laboras malpli. Neniu skribas al vi, neniun sendas

mesaĝojn. Oni volus vojaĝi, sed la lingvo! Se oni ne konas la lingvon, nur la pordisto de la hotelo estas preteta aŭskulti vin. Esperanto estas potenca rimedo kontraŭ soleco. Se vi sukcesas informi pri tio la homojn, vi ricevas la armeon por konstrui la ponton.

Esperanto prezentigas tre simple en si mem, sen vualoj mesiaj iaspekaj: lingvo pli simpla ol la aliaj ne apartenanta al iu lando. Sufiĉas prezenti poste la kalendaron de Esperantaj aranĝoj por konvinki sen predikoj. La mesaĝo estas simpla kaj certe krom la utilecon de la lingvo por eliri el si mem kaj koni aliajn mondojn oni perceptos ankaŭ ceterajn valorojn, kiel fratecon, sed temas pri intimaj aferoj, kiujn oni sentas kaj aprezas sed ne decas kaj ne estas konvene flirtigi kiel flagojn.

Venontjare, okaze de la jaro de la lingvoj, UEA povas lanĉi kampanjon kun temo ekzemple "Ni parolu inter ni" (ne por la paco sed por la amikeco, kiu certe ne signifas malpacon), kunlabore kun lingvaj landaj institutoj, por oferti kursojn, tekstojn ktp en pluraj lingvoj, inter kiuj estas ankaŭ nia lingvo kiu multobligos la eblecojn, aperante kune kun la aliaj lingvoj en multaj programoj kaj retejoj.

Dum la lastaj jaroj Esperanto relanĉiĝis precipe dank' al kontaktoj pere de la reto, sed mi konstatas ke multaj novuloj, kiuj esperantiĝis per www.disvastigo.it, post kelka tempo perdis intereson. Certe ne kuraĝigas novulojn oldamikaj renkontiĝoj kaj celebrado de pioniroj fare de samideanoj en bulvardo de l' krepusko. Ne profiti je la potenca helpo, kiun povas doni al Esperanto la reto, estas malsaĝe, sed la problemo estas la movado, kiu tre ofte forĵetas novulojn.

Laŭ mi estas tempo por renovigo kaj por prezidanto pli entreprenema.

Giorgio Bronzetti (Italio)

**La deka
Internacia Fotokonkurso
de "La Ondo"**
Sendu viajn fotojn.



Pri la recenzo de Jorge Camacho

Mi estas la aŭtorino de *Tabelo*, kiun Jorge Camacho recenzis en la julia *Ondo*.

Kiam mi ekhavis ideon pri dramo, mi skribis verkon ĉu Esperante (*Tabelo*) ĉu itallingve (*Tabula*). Dum la instruisto korektis nur la italan version, samtempe la Esperanta versio progresis. Poste mi forlasis la kurson, ĉar mi opiniis, ke *Tabula* jam povos partopreni sukcese en belartaj konkursoj en Italio. Intertempe, mi kontroligis la esperantan version fare de lertaj esperantistoj.

Poste, okaze de la pasintjara Universala Kongreso en Florenco, mi eldonigis *Tabelon*. La dramartinstruisto skribis enkondukon itallingve. La itala versio ankoraŭ ne estis eldonita aŭ prezentita.

Plie, *Tabelon* mi preferis al *Tabulo*, ĉar (laŭ PIV2005) *Tabelo* signifas:

1 Ligna tabuleto, unuflanke kavigita kaj tegita per tavolo da vakso, sur kiu oni desegnis literojn per unu pinta fino de la grifelo kaj eventuale forglatis ilin per la alia, plata fino.

2 Metoda aranĝo kaj ordigo de nomoj, nombroj aŭ signoj sur paperfolio aŭ similaĵo, ktp.

3 Presita metoda listo de nomoj, nombroj aŭ vortoj, ktp.

4 Datenstrukturo, konsistanta el aro de samspekaj elementoj, ktp.

Laŭ tiuj difinoj mi pensas, ke *Tabelo* estas pli taŭga por traduki la italan *Tabula*. Krome mi volas klarigi, ke mi ne intencis kompari la agojn de la personoj en mia dramo kun ŝaktabulo. Nur Gianni Cascone, la aŭtoro de la enkonduko, skizetas tion.

Anna Maria Dall'Olio (Italio)

Pri la Floraj Ludoj

Koncerne la ekstersezonan replikon fare de Hektor Alòs, permesu al mi citi la unuan alineon de letero de Abel Montagut al mi kun dato 1993 12 31 (citita kun la permeso de la aŭtoro de la letero):

«Unuavice gratulojn pro viaj premioj en la lastaj Internaciaj F(P)loraj Ludoj, eĉ se vi, pro misdecido, miaopinie, de la juĝantaro, ne ricevis la Naturan Floron. Cetero, kvankam tute senrilate al via konkreta nomo, ĉar mi defendintus mian opinion sendepende de la premiito kaj mi ne certis pri viaj konkursantaj verkoj, mi ne povis ĉeesti la kunsidon de la ĵurianoj kaj mia balotilo ne alvenis ĝustatempe pro poŝta malfruo (laŭ la parola informo de la sekretario, malgraŭ lia alidira skriba raporto). Mi ne komprenas, kiel oni povos revigligi ĉi tiun prakonkurson, se la unuan jaron kiam oni asignas monpremion por pli efektive motivi partoprenuntojn, oni ne aljuĝas ĝin, eĉ ne distribue, kiel rimarkigis Hektor Alòs. Krome, laŭ la regularo: "La Ĵurio aljuĝas la Naturan Floron al la plej valora verko el la aljuĝitaj Ordinaraĵaj Premioj". Necesas nur decidi kiu el la premiitaj estas la plej valora laŭ la ĵurianoj. Sed estas kontraŭsence ne aljuĝi ĝin: se oni ne aljuĝas tiun Naturan Floron, oni devas ne aljuĝi la ceterajn ordinarnajn premiojn, kaj inverse».

Eblas konkludi el tiu letero, ne nur ke oni agis kontraŭ la regularo de la Ludoj, sed ke plej verŝajne ankaŭ la balotadan proceduron oni ne respektis.

Jorge Camacho (Hispanujo/Tajvano)

Centjariĝa gratulo el Roterdamo

Karaj gesamideanoj,

Kun granda plezuro mi sendas plej elkorajn gratulojn al vi ĉiuj, kiuj kunfestas la 100-jariĝon de la organizita Esperanto-movado en Kenigsbergo-Kaliningrado.

Estas tre feliĉe, ke en la urbo, kiu havas longajn kaj glorajn tradiciojn en la kultura historio de Eŭropo, ankaŭ la Esperanto-movado firme enradikiĝis. Tra la tuta Esperantujo ĝi nun estas konata kiel hejmo de unu el la plej prestiĝaj Esperanto-revuoj, *La Ondo de Esperanto*, kaj de la eldonejo *Sezonoj*, kiu jam de multaj jaroj realigas altkvalitan eldonprogramon de Esperanto-libroj.

La granda filozofo Kant iam lanĉis en via urbo sian pledon *Al eterna paco*. Li ĝojus pri diversaj pozitivaj evoluoj de la postaj tempoj, sed pri multo li estus profunde seniluziigita. Li verŝajne tute ne komprenus, kiel en la hodiaŭa Eŭropo oni samtempe laŭte fieras pri malapero de limoj kaj tamen per postulo de vizoj malfaciligas la transiron de limoj. Ni esperu, ke almenaŭ de siaj plej senperaj najbaroj neniu estu disigita per netransirebla limo kaj ke tio ne restu revo por fora estonteco.

Agrablan feston kaj multajn sukcesojn por la dua jarcento!

Osmo Buller, (Ĝenerala direktoro de UEA, Roterdamo)



Ŝanco por Johano, ŝanco por Nikolao

Novelo de Leif Nordenstorm

Li jam dudek kvin jarojn laboras en la oficejo. Pro la longa oficperiodo li jam estas sperta dungito. Li parkere scias ĉiujn nomojn de la pli ol kvin cent dungitoj kaj iliajn oficojn. Tio estas tre grava scio por korekta ordigo de poŝtaĵoj, kio ŝparas amason da mono al la kompanio. Se letero kun grava mendo estas ordigita en nekrektita fako, la mendo devas esti resendita al la korekta ricevanto. La mendo sekve estas ekspedita nur je unu tago pli poste, kaj la mendinto — ĉe kiu grava maŝino ne povis funkcii pro manko de vicpeco — estonte mendos vicpecojn de alia kompanio. Eĉ pli gravaj estas pripersonaj konoj por ordigo de letero kun neklara adreso. Johano Johnsson post dudek kvin jaroj en la oficejo, tamen preskaŭ ĉiam ordigas eĉ tiujn leterojn en la ĝustan fakon. Li jam scias kiuj kutimas ricevi leterojn el kiuj kompanioj. Johnsson scias ankaŭ kiuj kutimas ricevi privatajn leterojn al la laborejo. S-ro Möller en la ekonomia sekcio post sia familia vojaĝo al Tenerifo plurfoje semajne ricevas leteron el Danio, sur kiu neniu sendinto estas indikita. Oni ja povas imagi... Same pri F-ino Ekman en la teĥnika sekcio. Ŝi ankoraŭ loĝas ĉe sia patrino, kiu verŝajne estas tre scivolema. Tial iu amiko sendas leterojn al ŝia laborejo. Tute diskrete li skribas sian adreson dorsflanke, indikante nur la komencan literon de la persona nomo, por ke aliaj homoj ne sciu ĉu la sendinto estas viro aŭ virino.

Aliajn problemojn kaŭzas la internaj poŝtaĵoj. Ili ordinare estas sendataj en brunaj reuzataj kovertoj. Sur ĉiu flanko de reuzata koverto estas kvar kolumnoj kun dudek kvin linioj. Sur ĉiu linio estas loko por unu adreso, tio

estas nomo kaj sekcio de la kompanio. Tiel ĉiu koverto povas esti uzita ducenfoje. Tio estas eĉ pli bone por media protektado ol reciklado de paperaĵoj. Johano Johnsson ege kontentas pri tio ke lia laboro kondukas al pli bona medio. Antaŭ dek jaroj oni ĉiam pli multe parolis pri tio ke la ĉiam pli multa uzado de komputiloj kondukos al senpapera oficejo. S-ro Johnsson tamen rimarkis nenian malkreskon de la nombro de poŝtaĵoj. Tute male. La printitaj dokumentoj estas tiel belaj kompare al la antikvaj tajpitaj, ke multaj oficistoj tute sen necese kopias ilin grandnombre kaj dissendas ekzemplerojn al diversaj sekcioj de la oficejo.

Iun tagon la estro de la administracia sekcio tamen vokis Johanon Johnsson al sia oficejo. Johano iom miris pri tio, ĉar tio nur malofte okazis. Principe tio devis okazi ĉiun jaron, kiam la estro informis al Johano pri eventuala altigo de la salajro, kaj samtempe utiligis la eblecon demandi de Johano kiel li kaj lia familio fartas. Tio tamen jam okazis ĉi-jare: Kia do estas la kialo de la hodiaŭa alvoko?

La estro kiel ĉiam petis al Johano sidiĝi kaj komencis per la kutima demando pri lia propra kaj la familia farto. Poste la estro direktis siajn okulojn al la fenestro de la ĉambro kaj komencis rakonti ke okazas grandaj ŝanĝiĝoj en la socito kaj do ankaŭ en la kompanio. La ĉefestro nun decidis ke oni pli efike ol antaŭe utiligu la eblecojn de komputiloj, retroŝto kaj komputiloj. Oni nur esceptokaze printos dokumentojn, sed ŝparas ĉion en la durdiskoj de la komputila sistemo, kiujn oni kopios plurfoje tage, por ke oni ne perdu iujn informojn. Sekve oni ne bezonos tiom da dungitoj por prizorgi la internan distribuadon de poŝtaĵoj. Por la estonto sufiĉos du personoj. El la nunaj kvar unu pensiuliĝos la venontan jaron, sed tamen unu estos troa. Feliĉe unu purigisto ĵus finis sian laboron, kaj oni bezonas anstataŭanton. Do, Johano bonŝance ricevos

alian laboron, ĉar li estas tiu, kiu devos ĉesi labori kiel internpoŝtisto.

Johano Johnsson subite rimarkis ke lia koro batas duoble pli rapide ol kutime kaj ke subita varmo en lia vizaĝo atestas pri ruĝiĝo. Eĉ la voĉo ne kondutis normale, ĉar kiam li volis rakonti ke li ja laboris dum dudek kvin jaroj kaj parkere konas la nomojn de ĉiuj dungitoj, li nur sukcesis diri:

— He...

La sekciestro nur nun kompatante redirektis siajn okulojn al Johano, dirante ke ja kompreneble ĉiam estas ŝoko ke oni devas ŝanĝi laboron, sed ke tio tamen estas pli bone ol senlaboreco.

Johano nun streĉis siajn fortojn:

— Mi ne akceptas tion ĉi. Ĉu mi purigu la plankojn? Neniam! Neniel! Se vi ne komprenos kiom da sperto mi havas pri mia laboro, mi ne devigos vin. Mi ekŝiĝas!

Reirante al la poŝta centralo, Johano sentis ian malŝarĝiĝon en sia brusto. Li ĉiam opiniis ke lia laboro estis sekura laboro, sed li ja havis ankaŭ aliajn planojn por sia vivo. Fariĝi milionulo! Nun tio okazos.

La venontan vendredon Johano ricevis belan horloĝon kaj florbukedon. Je la posttagmeza kafumado la kompanio eĉ regalis per kuko, kaj ĉiuj laboristoj de la sekcio kaj la estro estis ege ĝentilaj. Oni ankaŭ prezentis Nikolaon al li. Tiu estis junulo kun brunaj okuloj, kaj kun eksterlanda familia nomo. Ege bone ke tiu enmigrinta junulo ricevis la purigistan postenon, kiun Johano neis. Estis bonege por Johano, kiu nun fariĝos milionulo, kaj por la junulo, kiu ne devos esti senlabora.

Sabate kaj dimanĉe Johano havis bonajn liberajn tagojn kun siaj edzino, filo kaj filino. Ili ĉiuj ĝojis pri la florbukedo, kaj la knabo ricevis la malnovan horloĝon, kiun la patro ne plu bezonis.

— Kiam mi estos milionulo, vi kompreneble povos mem elekti vian preferatan horloĝon.

Lunde la seriozaj aferoj devos komenciĝi. Johano Johnsson fakte ne

estis tute senmona, sed dum dudek kvin jaroj ŝparis. Nun li havis konsiderindan kapitalon, kaj ankaŭ propran domon. Baldaŭ sepdek kvin procentoj de la prunto estos pagitaj. Do oni povos poste prunti pli da mono, ĉar la domo povos servi kiel garantiaĵo.

Jam matene kiam la gefiloj iris al la lernejo kaj la edzino al sia laborejo, Johano unue iris al la fonduso por senlaboruloj. Dum dudek kvin jaroj li pagis sian kotizon al la fonduso. Nun li iom ricevos. Li klarigis ke li perdis sian laboron, kaj la oficisto donis al li formularon, kiun li plenigis, promesante ke aktive serĉos novan postenon. Ĝis kiam li havos novan postenon la fonduso pagos al lia banka konto ĉiusemajnan kontribuadon, kiu post du monatoj komencos malkreski por ke li serioze klopodu trovi novan laboron. Tiel klarigis la oficisto. Johano dankante ĝisis.

En la grandmagazeno estis sekcio por vetado kaj monludo. Sur kelkaj televidaj ekranoj montriĝis la nomoj de ĉevaloj, kiuj konkuras sur trotejoj en la tuta lando. Alia ekrano montris futbalajn kaj hokeajn matĉojn, kiuj okazos semajnfine. Tria ekrano ĉiun kvinan minuton montris la novajn ciferojn — kaj tiuj, kiuj indikis ĝuste tiujn nombrojn pagante fiksitan sumon, devus gajni amason da mono. Kvara ekrano montris ludkartojn, sed Johano ne certe komprenis kiel funkcias tiu ludo.

Jam dum la pasinta jaro onklo Oskaro rakontis pri la virĉevalo Narciso, kiun posedas lia amiko. Tiu ĉevalo simple ne povas malgajni, krom esceptokaze, se li ne estas tute sana, aŭ se estas malbona ĵokeo. Tiel klarigis onklo Oskaro. Kaj fakte! Narciso dum la jaro gajnis amason da ĉampioneco. Li malgajnis nur kiam iom malsana aŭ tuj post la resaniĝo.

Laborante en la kompanio Johano jam komencis iom veti. Ĉiufoje li gajnis, sed bedaŭrinde nur malmulte ĉiufoje, ĉar la vetŝancoj estis malaltaj. Oni jam komencis diri ke veto je Narciso ne estas veto, sed investo.

Johano tuj vetis je Narciso. La vetkurado okazos en alia urbo, sed dank' al la komputiloj oni povas ĉie veti, eĉ hejme, sed estas pli agrable sidi en la grandmagazeno babilante kun aliaj vetemuloj, atendante la finan rezulton. Cetere, kial ne intertempe provi la kvinminutan vetadon? Nur kelkajn monerojn! 25 22 18 27 34 23 54 07. Nur hazarde elektitaj ciferoj. Atendo. Kvin korektaj. Gajno! Bedaŭrinde multaj aliaj vetantoj same havas kvin.

Do, nur eta gajno. Tamen iom. Oni devas provi denove. Ba! Malgajno. Kaj denove. Ba! Refoje malgajno. Tamen restas dek minutoj ĝis kiam oni scias pri la rezulto de Narciso. Oni provu denove. Aĉ! Denove malgajno. Kia malbonŝanco. Feliĉe Narciso gajnis. Do, li preskaŭ ĉion ricevis.

Jes ja! Li promesis kuiri hodiaŭ. Pli bone aĉeti nun, ĉar li jam estas en la magazeno. Espereble nun la mono de la fonduso alvenis al la konto. Do, unue li bezonas monon.

Iri al la banko. La mono venis al la konto. Estas tempo iri hejmen por kuiri, ĉar kiam la edzino laboras li kompreneble kuiri, sed restas iom da tempo, kaj li povas iom pli ludi en la grandmagazeno. 27 65 23 54 01 02 25 33. Li ne povas malgajni. Por esti tute sekura li preĝas al Dio. Aĉ, bedaŭrinde malgajno. Li aĉetas iom malpli koston manĝaĵon. Morgaŭ li tamen gajnos, kaj aĉetos pli multekostan. Fakte, kaĉo ne estas malbona manĝaĵo. Multaj bonaj sportistoj manĝas kaĉon. Tion oni diras en la reklamaj filmoj de la muelila industrio.

La postajn semajnojn kaj monatojn kaj jarojn preskaŭ ĉiutage la samo okazis. Johano gajnis kaj malgajnis. Plej ofte li malgajnis. Post kelkaj semajnoj la edzino komencis plendeti ke la

manĝaĵoj ĉiam estas tiel simplaj — kiel manĝaĵoj de arbarlaboristoj en kabano. Johano ploris kaj promesis pli bonajn estonte... ĉar li havis profitodonajn planojn, sed nenio okazis. Vestaĵojn por la infanoj la edzino komencis aĉeti en magazenoj por uzitaĵoj. Ne estis mono por feriaj vojaĝoj, aŭ simple ne tempo, ĉar Johano fervore ludis por gajni la milionon.

Post du jaroj la edzino minacis ke estos eksgeedziĝo, se Johano ne petos ajnan laboron. Li devis konfesi ke la tuta mono estis forludita, kaj promesis pliboniĝon.

La tagon poste li kun pezaj paŝoj iris al la komunuma laborporejo por peti laborlokon.

— Ion ajn mi volas, — li diris.

La oficisto ridetis dirante:

— Vi estas saĝa. Oni devas akcepti ion ajn. Ekzistas nova kompanio en nia urbo. Juna lertulo fondis kompanion, kiu prizorgas la purigadon en deko da oficejoj kaj lernejoj. Oni ne povas imagi ke junulo estas tiel entreprenema. Mi donos al vi lian telefonnumeron. Estas Sinjoro Nikolao...

La familian nomon Johano bone rekonis. Li akceptis la papereton kun la telefona numero, kaj kun eĉ pli pezaj paŝoj iris hejmen por telefoni.

Laŭda mencio en *Liro*-2006

***La Ondo de Esperanto* denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la internacia literatura konkurso *Liro*.**

Liro-2007 havas kvin branĉojn:

1. Originala prozo

2. Originala poezio

3. Traduka poezio: Poemoj de Saŝa Ĉjornyj (Aleksandr Glikberg), okaze de lia 75a mortodato

4. Traduka prozo (el la rusa): *Anmekapua* de Anton Ĉeĥov

5. Traduka prozo (el la angla): *Eveline* de James Joyce (novelaro *Dubliners*)

En la branĉoj 1–3 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ 15 okt 2007.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj petu ĉe la sekretario kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkupono. La elektronikaj tekstoj estas elŝuteblaj ĉe: <http://Esperanto.Org/Ondo>.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2007. La organizanto ĝis 1 jan 2010 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevita konkursaĵo en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Sukcesojn!

Halina Gorecka
sekretario de *Liro*-2007



Kohera mozaiko

Künzli, Andreas. *Universalaj Lingvoj en Svislando: Svisa Enciklopedio Planlingva*. — La Chaux-de-Fonds: Svisa Esperanto-Societo; Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale, 2006. — 1129 pĝ., il.

Dikaj — milpaĝaj — libroj en kaj pri Esperanto estas forta kaj peza argumento en la disputo ĉirkaŭ la praktika sukceso de tiu idealisma projekto. Ni forlasu por momento la ideon de **finavenko** — eĉ la angla ne povas nun pri ĝi fanfaroni. Ni forlasu por minuto la dimension de kvalito — sukceso evidenta, se tiaj libroj aperas en situo, kie apenaŭ sentblas iu alia motivado krom la kultura. Ni povas klare vidi ke ekzistas certa kritika maso, kiu generas — jam tute fatale — certan produkton, spontane, laŭ leĝoj de sia interna neceso, laŭ sia naturo. Ĝi, tiu maso, certe ne garantias al Esperanto longan vivon, sed kompanse kaj minimume ĝi garantias specifan senmortecon kompareblan kun tiu de la latino.

Revenante al la kvalita taksado, kiun (malgraŭ multaj klopodoj) oni logike kaj fizike ne povas elimini el kultura konsidero, ni rimarku, ke paralele al similaj fenomenoj en modernaj naciaj kulturoj Esperanto demonstras la tendencon de polusiĝo, separado de kulturaj niveloj. Tiu disiga tendenco baziĝas sur heterogena karaktero de la kultura lingva akumulo. De unu flanko kreskas spirita kaj intelekta sperto, kiu pliriĉiĝas — malgraŭ ĉio — per la simpla fakto del daŭrigo de la Esperanta historio. De la alia flanko kreskas premo de la segmento de simplisma kulturo populara. Ĉe tiuj du polusoj ni kons-tatas lastatempe kristaliĝon de du plen-ampleksaj produktoj. Pri unu — Esperanto-gramatiko de Bertilo Wennergren — mi jam havis okazon anonci mian juĝon. La dua — *Svisa enciklopedio planlingva* de Andreas Künzli — estos tuj la objekto ĉi-recenza.

Natura bezono de matura kulturo — “resumi kaj bilanci” la pli ol jarcentan historian periodon del evoluo interlingvistika iĝis por A. Künzli impulso al lia imprese granda laboro. La neceso ekzistis — ĝi trovis konversajn lokon, kondiĉojn kaj personon por sia realiĝo. Svislando estas krucvojo de Eŭropo, kie miksiĝas kaj interfer(enc)as lingvoj, tendencoj kaj ideoj. La bezono de pli senpera kontaktado sentblas tie tre



klare. Ĝi estas la lando, kie plej koncentriĝis la alternativaj al Esperanto universalaj lingvoj: Volapük, Ido, Occidental, Interlingua. En Svislando en la urbo La Chaux-de-Fonds troviĝas jam duoncentjare Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) kun ĝia entuziasma arkivisto Claude Gacond.

Por la genezo de la vivo necesis kunfluo de diversaj fizikaj cirkonstancoj. Por la genezo de bona libro necesis densa kuninfluo de scioj kaj cerboj. Sed ne nur tio. La svisa esperantisto Claude Piron parolas pri arketipoj, kiuj sin identigas per Esperanto. Esence temas pri la tipo de idealisto, kiu estas motora por ĉiu aŭtenta homa aktivado. Esence tiu tipo portas sur si la t.n. civilizon kun ĝiaj spirita kaj teknikaj atingoj. Ĝuste la sorto de tiu tipo difinas la estonton de Esperanto, sed ĝi ankaŭ difinas la estonton de la homaro. Kaj ni bone rimarku, por nia okazo ege gravas tiu koncentro de kuninfluo, tiu kondensado de energioj (ne astraj, sed tute homaj), kiu ebligas la fenomenon de alta kulturo.

La enciklopedio enhavas 12 partojn: enkondukan, sekciojn pri kvin lingvoj internaciaj, partojn interlingvistikan kaj esperantologian, kronologio-resuman, fontindikan, nomindeksan kaj fine — ŝlosilan vortaron. Krom tio, la enciklopedio entenas riĉan antologion, kies apuda ĉeesto estas tre gajna akiro de la libro: ĝi vivigas kaj kolorigas la necesojn sekajn informojn, multobligas ties efekton, portas suplementan scion kaj provokas aldonan intereson.

La enciklopedio priskribas amason da faktoj de plej diversaj originoj. Sed, nature, kiel tion emfazas la aŭtoro, “la

homo staras en la centro” de la libro, kiu, variigante la punktojn del vido, rakontas — ofte plurfoje kaj multeface — pri ĉirkaŭ 500 personoj.

A. Künzli sukcesis transplantati en sian verkon la trankvilan, neŭtralecan, tolereman etoson de CDELI, pri kiu skribas enkonduke C. Gacond. *Sine ira et studio* la enciklopedio traktas la plej problemajn temojn, kaj la polemikoj en la antologio nur substrekas tiun objektivismon. Feliĉe, la komenta neŭtraleco ne signifas ĉi-okaze mankon de propra opinio. Künzli scias neŭtrale informi, komenti, analizi, sed li scias ankaŭ sintezi. Li ne trudas, sed li ŝatas kaj trovas normala resumi.

De ajna punkto de tiu libro ni plonĝas en realecon de faktoj kaj ideoj: etaj kaj egaj, abstraktaj kaj konkretaj, lokaj kaj universaj, ili interplektiĝas kaj katalizas la penson. La svisa enciklopedio kreskas el faka ĝis vere ĝenerala informilo. Ne nur svislandaj esperantistaj problemoj, sed tiuj de tuta Esperantio, ne nur Esperantio, sed ankaŭ la tuta homaro kun siaj drastaj doloroj sociaj kaj etikaj, ne nur Esperanto, sed ĝiaj rivaloj kaj la tuta planlingvistiko sin montras el tiu sisteme organizita aro de tekstoj, komentoj, informoj kaj rimarkoj.

La tuta panoramo — vasta kaj klarlinea — donas malgraŭ la abundo de kontrastoj la ideon de interna unueco. Legante la libron mi havas la altiran impreson, kiun mi iom nostalgie rememoras de mia infaneco, kiam en la domo del onklino mi rigardis en grandan pezan kristalon, starantan surkomode. Ene, post ioma griz-blua oni distingis vilaĝon kaj arbaron, kaj se oni skuis iom la kristalon, neĝo komencis fali sur arbojn kaj tegmentojn. Tiu nevola komparo ŝajnas diri pli ol mi pensis. Laŭ la fantazio de unu svisa verkisto, ie inter svislandaj montoj situas certa Kastalio, areo de elituloj, fremdaj al la intereso de la vanta mondo. Kelkfoje, eĉ ofte, moderna Esperantio similas esti tia teritorio, izolita, sekterena, vivanta “post la vitro” kaj per si mem. Sed — malgraŭ ĉio — mia imago havas alian simbolecon, ja la areo de Künzli emanigas alian etoson. Mondon multe pli kondensan ni vidas ĉi-profunde, la mondon en ĝia riĉo, komplikoj, belo kaj idealismo, en ĝia interna perturbo.

“Ĉu Esperanto postvivis la jaron 2045?” — demandas kun forta dubo Tazio Carlevaro. A. Künzli ne estas

tiom senespera. Lia sobra optimismo sin apogas sur sufiĉe larĝa horizonto de la riĉa kaj bunta kultura stratumo, kiun li respegulis en sia varia, sed kohera kaj (oni devas konstati) arte komponita mozaiko.

— Eraroj ne estas eviteblaj, — diras prudente la aŭtoro, sed eĉ en la renoma *Encyclopædia Britannica* estis malkovritaj 123 eraroj. Sekvante la saman vojon, mi povis ĝis nun detekti 6. Ses pure teknikaj mistaĵoj kiel tributo al via kritika soifo, Andy! Plion mi ne povas prezenti.

Alen Kris

Infantravivaĵoj

LeQuint, Armela. *Infantravivaĵoj: Aŭtobiografia rakonto*. — Thaumiers: [La KancerKliniko], 2006, — 36 pĝ.

Legi pri infaneco kaj adoleskeco de samlandano estas interese, sed pli interese estas kompari kun travivaĵoj de nesamlandano.

La rememoroj de Armela komenciĝas de kvin jaroj aŭ eĉ pli ĉar ŝi memoras germanajn soldatojn okupintaj Francion. Ravas la legantojn interesa fakto, ke ŝin prizorgis ne la gepatroj, sed multnombraj avinoj, gepraonkloj, onklinoj kaj vicpatrino. Imagi tion al mi mem ne eblas, konsiderante ke Armela tamen havis la gepatrojn. Ankaŭ estas interese ekscii, ke tiuj ĉi pseŭdogepatroj instruis ŝin per manĝakaj piedbatoj!!! Certe mia patro ĉiam havis ĉe la mano sian soldatan rimemon kun stelhava buko. La rimeno en la mano de la patro ĉiam trovis ies dorson aŭ pugon de liaj tri filoj. Tamen la priskribita instrumentado havas sian pozitivecon — malgraŭ dolorigaj lecionoj la fina produkto ĉiam estas bonkvalita!

Tion pravas Armela mem per sia verko skribita en seka maniero sen sentoj. Ŝi mem skribas pri tio: “Fakte mi rakontas nur kiel spektanto kun malvarma rigardo. Mi ne tro inklinas al melodramo”. Kun la esprimo oni povas konsenti traleginte ŝiajn infantravivaĵojn.

Anatolo Sidorov

Samideanoj

satiroj kaj humuraĵoj

petu ĉe via libroservo

Prezo: nur 7.50 eŭroj

Agnes Miegel

La virinoj de Nidden

*En Nidden virinoj postenis ĉe l' mar'
Kun bruna man' antaŭ l' okul-par',
Boatoj alvenis en tempesta hast',
Nigraj flagetoj lange flirtis sur mast'.*

*Boatojn ligis la viroj per ĉen'.
“Bolas la pesto sur transa teren’.
De Heydekrug ĝis Schaaken en valo
La homoj iras en funebra vualo!”*

*Replikis virinoj: “Jen nia sort’,
Sursojle embuskas la mort’
Tagon post tag’ de Dio donita:
Jen nia vivo milita.*

*La nigra duno — sufiĉas ĉi fat’,
Di’ nin indulgos malgraŭ la bat’.”
Sed la pesto alvenis lun-lume
Kun alkoj naĝis tralagune.*

*Tri tagojn, tri noktojn nur
Ploris sonoril’ en kirko-tur’.
La kvaran, en plej frua hor’
Sufer-rompiĝis la sonor’.*

*El kabanoj kun hezita paŝ’
Elvenis sep virinoj de l’ vilaĝ’.
Sen ŝuoj, en dolor’ klinitaj
En nigraj vestoj bunte broditaj.*

*Al la kruta dun’ ili impetis,
Ŝuojn kaj ŝtrumpojn surmetis,
Al la dun’ ili atestis:
“Nur nia sepo postrestis.*

*Nul meblisto por ĉerko-fara labor’,
Nek filo nek nepo por nia priplor’,
Por sakrament’ mankas la pastro,
Pereis servistoj kun mastro.*

*Atentu vi, ho blanka dun’,
Pordoj, portaloj apertas nun,
En niajn ĉambrojn vin movos,
Korton, fajron, grenejon disblovos.*

*Dio nin forgesis, kaŭzis pereon,
Prenu lian dezertan sanktejon,
Per kruco kaj Biblio vi ludos
Kaj nian tombon, panjo, vi trudos!*

*En funebran tolon volvu nin,
Vi, nia ben’, iama misdestin’.
Jen ni kuŝas, atendas kviete.”
Venis la duno kaj kovris komplete.*

*El la germana tradukis
Reinhard Haupenthal*



Agnes Miegel naskiĝis la 9an de marto 1879 en Königsberg (la nuna Kaliningrado).

Frue ŝi trovis sian propran tonon kaj ĝenron, la baladon kaj debutis libro-forme en 1901. Ankaŭ ŝia prozo ĉerpas siajn temojn el la historio de Orienta Prusujo. Ŝia kreskanta konatiĝo ŝin devigis leg-vojaĝi kaj portis al ŝi aron da literaturaj premioj, ankaŭ la honoran doktorecon (1929) de la hejm-urba universitato.

Ŝiaj vizioj transformiĝis en amaran realon, kiam en februaro 1945 ŝi forlasis la detruitan urbon kaj fuĝis al Danlando. En la germana Bad Neudorf ŝi trovis novan hejm-landon zorgate de sia adoptita filino.

La samlandanoj tenere nomis ŝin “Panjo Orienta Prusujo” kaj post ŝia morto (26an de oktobro 1964) fondis Agnes-Miegel-Societon kiu prizorgas la spiritan heredaĵon.

La balado *La virinoj de Nidden* prezentas epizodon sur la Kurlanda Ter-lango en la sama loko, kie Thomas Mann havis someran domon.

R.H.



Admirinda romano

Verga, Giovanni. *La Malemuloj: [Romano] / Tradukis el la itala kaj prinotis Giancarlo Rinaldo, Anselmo Ruffatti, Paola Tosato. — Pisa: Edistudio, 2006. — 263 pĝ.*

Jen unu el la ĉefaj romanoj de Giovanni Verga (1840–1922), nun konsiderata la plej grava itala prozisto de la 19a jarcento post Manzoni. *La Malemuloj* (t.e. malzorgemuloj) estas fakte la alnomo de unu familio en sicilia vilaĝo de fiŝkaptistoj, kaj la samtitola romano, aperinta en 1881, rakontas plurajn jarojn en la mizera vivo de ĉi familio, ĉirkaŭ 1865–1875. Ĝi faras tion naturalisme, kvazaŭ dokumente, prezentante turnopunkton en la historio de la vilaĝo, transire inter la tradicia socio preskaŭ feŭdisma (kun siaj dotoj, ŝvatoj kaj ia kosmetike krista paganismo) kaj la moderna Italujo kiun ĝi firme rezistas kaj rifuzas: “Ne pluvus plu, ĉar oni metis tiun malbenitan telegrafan draton, kiu altiras la tutan pluvon kaj forportas ĝin”.

Samkiel liroj kun pli fruaj moneroj, ankaŭ generacioj konflikte kunekzistas: geavoj, gefiloj, genepoj. Verga priskribas ilian penadon unutire, sen digresioj, kun abundo da dialogoj spicita per popolaj proverboj (“al rompitita ŝipo ĉiu vento malfavoras”), kondukante la leganton tra teksaĵo el klaĉoj kaj kvereloj, envioj kaj maĥinacioj, nuptoj kaj forpasoj. Li faras tion pesimisme, eĉ fatalisme, sed kun tia rakonta ritmo, ke oni povas legi ĉi romanon nur admire.

Tripersona teamo el la Laborista Esperanto-Klubo de Padovo elitaligis la verkon en lingvaĵo gratuline flua kaj natura (amuze, la enhavtabelo koboldo sukcesis ŝanĝi la vorton “kuntradukado” al “trukado”!). Kiel Laŭlum pri *Ĉe akvorando*, ankaŭ ili devis decidi kion fari per la nomoj: loknomojn ili lasis senŝanĝe en la itala lingvo; nomojn personajn kaj alnomojn, male, ili sisteme esperantigis, donante la a-finaĵon al nomoj virinaj. Aldone, la tradukon akompanas sufiĉe multaj piednotoj kaj plurparta enkonduko.

Por vortoj kaj esprimoj kiel “*pegi-ta”, “*ŝliĥto”, “dika fiŝo” (gravulo? matadoro?) aŭ “faligi ŝin per ŝiaj piedoj” bonvenus modifo aŭ klarigo. Anstataŭ “fortrivi sian hepaton”, la alifoje uzata “ronĝi sian hepaton (aŭ animon)” sonas pli kompreneble; same pri “prognozo” (aŭguro? omeno?) kaj “reduktiĝi” (ŝrumpi? defali?). Fine, necesus korekti “vivi *al”, “*Borbonoj”,

“*iskiatiko”, “*Erodo”, “*venerado” kaj “*monako” al resp. “vivi en”, “Borbonoj”, “iskiat-algio, iskiatdoloro”, “Herodo”, “kulto, pietato” kaj “monaĥo”, kaj studi iom pli atente la uzadon de “po” (“*popersone”). Mi mencias ĉi makuletojn escept-okaze, kiel postlecionon por la kuraĝaj kuntradukintoj.

La hispana verkisto Miguel Espinosa (1926–1982), en sia romano *La misburĝaro*, asertas ke en la mondo “ekzistas simple reganta kasto kaj obee kasto, ĝuanta kasto kaj sufera kasto, enuo senfina kaj doloro senlima”. Cent jarojn pli frue Verga skribas pri unu el la Malemuloj: “Li almenaŭ volus scii kial en ĉi mondo devas esti homoj kiuj vivas en gajo kaj plezuro, nenion farante, kaj naskiĝis kun la fortuno en la haroj, dum aliaj nenion havas kaj devas treni la vivoĉaron per la dentoj dum la tuta vivo”.

Jorge Camacho

Verko ne revelacia, sed ja pensiga

Privat, Edmond. *Interpopola konduto / Antaŭpar. Andreas Künzli. — 2a eld. — Czeladź: Hejme; Świdnik: Libro-Mondo, 2006. — 143 pĝ.*

Edmond Privat, apartenas ne nur al elstaraj esperantistoj, sed ankaŭ al multflanke aktivaj kaj talentaj eminentuloj de Svislando; siatempe li estis konata kaj respektata ankaŭ internacie. Interalie, li estis atestanto de la ekesto kaj de la laboroj de Ligo de Nacioj, kie li prezentis kaj defendis Esperanton. Lia libro *Interpopola konduto*, aperinta en 1935 kiel Esperanta versio de la francelingva *Le choc de patriotismes*, estas grandparte la frukto de la observoj kaj rimarkoj, faritaj dum la aktivaĵo ĉe la Ligo.

La libro prezentas la provon analizi la genezon de la malamo, perforto kaj milito inter la nacioj. La aŭtoro mencias kaj priparolas diversajn erarojn kaj misuzojn de patriotismo, naciismo kaj mesiismo. Superrigardon pri la temaro de la libro eble povas prezenti la listo de la ĉapitroj:

Animo nacia, La gento, Nacia van-teco, Nacia vero, Homoj kaj ŝtato, Homaj oferoj, Ŝtato kontraŭ ŝtato, Eklezio kaj ŝtato, Interna memkontrolo, Klasa konscio, Milito kaj revolucio, Popola konduto en Hindujo, Ne-perforto en Polujo, Mesianismoj, Ŝtatoj en societo, Kontrolo kaj protekto, Akiritaj kutimoj, Novaj mistikoj.

Strukture la libro pli similas al personaj notoj, ol al bone strukturita esploro. Enhave ĝi ne plenas je revelaciaj malkovroj — Privat plejparte parolas pri ĝene ĝeneralaj banalaĵoj, kiel pri manko de iu universala justeco inter la ŝtatoj, pri la duobla moralo de la ŝtat-regantoj ktp. Ĉefe do temas pri la sistemigo de la plej kutimaj misoj kaj hipokritaĵoj, dominantaj en la internaciaj rilatoj. Tamen, ne maloftas en la libro pli konkretaj pecoj — Privat ne avaras la historiajn ekzemplojn kaj instruojn, kiuj tuj plivigligas la iom tro teoriantan enhavon de la libro.

Koncerne la solvojn de la problemoj, ĝenerale Privat konfesas kaj subtenas la neperfortemon de Ghandi, la Zamenhofajn internaciismon kaj neŭtralecon, la mondan federaciismon. Klaras tamen, ke tiuj ideoj restas, bedaŭrinde, pure abstrakta rezonado. Malgraŭ tio, ke la aŭtoro multfoje konfirmas sian starpunkton per multaj historiaj ekzemploj, la ĝenerala tono de la libro estas pli morna, ol optimisma. Tamen, malgraŭ la morneco (kiu estas fakte la sekvo de la problema situacio), la libro estas tre pensiga, kaj multflanke eĉ informas koncerne multajn ne tre vaste konatajn historiajn faktojn. La ĉapitro pri neperfortemo en Hindio legeblas preskaŭ kiel pasiiga romaneto.

La libro estas bele eldonita, tamen kelkaj tajperaroj enestas. Kiel manko menciendas la foresto de almenaŭ mallongaj biografiaj informoj pri la menciataj personoj. Svarmo de nomoj, eble bone konataj al Privat kaj/aŭ al liaj samtempuloj, preskaŭ ĉiupaĝe devigas uzi iun enciklopedion. Ankaŭ la stilaj apartaĵoj de Privat kaj entute lia iom malnoviĝinta lingvaĵo ne ĉiam helpas facilan legadon: temas unuavice pri la sufiĉe libera vort-ordo kaj pri la ege ofta meto de la epiteto post la priskribatan vorton — la trajto ĝenerale karakteriza por Privat, sed ege teda ĉe konstanta uzo.

Malgraŭ tio, ke la libro nek stile, nek enhave povas esti elĉerpa monografio pri la temo, ĝi estas bona kaj pensiga legaĵo por ĉiu, kiun interesas la historio kaj la estonteco de la internaciaj rilatoj.


Pavel Moĵajev

ARKONES XXIII

**Poznań
(Pollando)**

21–23 septembro 2007

“LA MASTRO DE L’ RINGOJ” REAPERIS!



Tõnu Hirsik, la prezidanto de la Esperanto-Asocio de Estonio, iĝis la unua aĉetinto de la nova eldono de *La Mastro de l' Ringoj* de John Ronald Reuel Tolkien, premiere prezentita de la ruslanda eldonejo *Sezonoj* la 15an de julio 2007 en la 43aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Ŝiauliai (Litovio).

Aleksander Korĵenkov, kiu redaktis la novan eldonon, rakontis en la prezentado pri la aŭtoro, pri la legenda verko, kaj pri la Esperanta traduko de William Auld, kiu elĉerpigis baldaŭ post la unua eldono.

La dua eldono estis presita en Kaŭno (Litovio) kun kovriloj de Vladimiras Beresniovskas kaj speciala banderolo, kiu kuntenas la tri volumojn (*La Kunularo de l' Ringo*, *La du turegoj* kaj *La reveno de la Reĝo*). Zorga kontrolado fare de Brian Drake, Andreas Emmerich kaj William Harmon ebligis elsarki erarojn, kiuj estis en la unua eldono. Valorajn konsilojn donis Bertilo Wennergren (kiu tradukis du pliajn tekstojn por la reeldono), Hoss Firooznia, Edmundo Grimley Evans kaj Aleksander Osokin. Povilas Jegorovas helpis ĉe la traktado kun la presejo.

La novan eldonon la redaktoro prezentis ankaŭ en la festivalo *Arta Lumo* en Kuopio (Finnlando). Ĝi estis aĉetebla en la 18a Ekumena Esperanto-Kongreso (Pelplin, Pollando). Nun la eldonejo dissendas la librojn al la mendintoj, kaj baldaŭ la 1200-paĝa *La Mastro de l' Ringo* estos mendebla ĉe la libroservoj de UEA, FEL, ELNA, GEA, EAB, JEI kaj ĉe aliaj libroservoj kontraŭ 75 eŭroj.

Kadre de ARKONES XXIII (Poznań 21–23 sep) la libro estos denove prezentita, kaj tie oni povos favore aĉeti ĝin kaj akompanan broŝuron *Unu Ringo ilin regas* de Aleksander Korĵenkov.

Ses ĉapitroj el *La Mastro de l' Ringoj* kaj kelkaj aliaj tekstoj de/pri Tolkien estas legeblaj en la retpaĝaro de *Sezonoj* <http://www.esperanto.org/Ondo/> en la rubriko *Tolkien en Esperanto*.

HaGo

Ricevitaj libroj

Gvidlibro 2007 / Redaktis Roy McCoy. — Rotterdam: UEA, 2007. — 96 pĝ.; il. — [Donaco de H.Gorecka].

Jarlibro 2007 / Redaktis Roy McCoy. — Rotterdam: UEA, 2007. — 278 pĝ.; il. — [Donaco de H.Gorecka].

Korĵenkov, Aleksander. *Ankoraŭfoje pri la Esperanta gazetaro*. — Kaliningrado: Sezonoj, 2007. — 16 pĝ. — (Serio *Sed ne el katedro*; №3). — [Donaco de Sezonoj].

LeQuint, Armela. *Infantravivaĵoj*: Aŭtobiografia rakonto. — Thaumiers: [La Kancer-Kliniko], 2006. — 36 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Privat, Edmond. *Interpopola konduto* / Antaŭpar. Andreas Künzli. — 2a eld. — Czeladź: Hejme; Świdnik: Libro-Mondo, 2006. — 143 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Verga, Giovanni. *La Malemuloj*: [Romano] / Tradukis el la itala kaj prinotis Giancarlo Rinaldo, Anselmo Ruffatti, Paola Tosato. — Pisa: Edistudio, 2006. — 263 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

Ricevitaj gazetoj

Antaŭen. 2007/15; Aŭstria Fervoĵisto. 2007/2; EAB Update. 2007/38; Esperanta Finnlando. 2007/3b; Esperanto aktuell. 2007/3; Esperanto sub la Suda Kruco. 2007/4; Esperanto. 2007/7-8; Femina. 2007/10; Frateco. 2007/75; Heroldo de Esperanto. 2007/8,9; Informilo por Interlingvistoj. 2007/2-3; Informilo. 2007/6; Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio. 2007/3; Internaciisto. 2007/4; KAE-Informilo. 2007/59; Kataluna Esperantisto. 2007/342; Komencanto. 2007/3; Kontakto. 2007/3; La Gazeto. 2007/130,131; La Lanterno Azia. 2007/4,6; La Movado. 2007/675,676,677; La Ondo de Esperanto. 2007/7; La Revuo Orienta. 2007/6; La Sago. 2007/37 Literatura Foiro. 2007/227; Monato. 2007/7,8-9; REGo. 2007/4; Svisa Esperanto-Societo Informas. 2007/2; Sagisto. 2007/1,2,3,4,5,6,7; Scottish Esperanto Buletin. 2007/2; Sennaciulo. 2007/5,6; Service de Presse. 2007/37; Verda Saksofono kaj Triskelo. 2007/3; Zagreba Esperantisto. 2007/2.

Jarlibro 2007

Portreto de Antoni Grabowski (1857–1921) malfermas la ĉi-jaran Jarlibron de UEA omaĝe al la 150a datreveno de la granda poeto-tradukisto, kiu grave influis la evoluon de la nova lingvo.

Kun 1733 adresoj en 102 landoj la Jarlibro havas 56 delegitojn malpli kaj 3 landojn pli ol pasintjare, kiam estis 1789 delegitoj en 99 landoj. Estas 53 ĉefdelegitoj (52 en 2006), 976 (1006) lokaj delegitoj, 118 (116) vicdelegitoj, 39 (40) junularaj kaj 1295 (1333) fakaj delegitoj. Krome en Brazilo estas 5 regionaj delegitoj. La fakdelegitoj reprezentas preskaŭ 800 fakojn.

La plej “delegitoza” lando estas Brazilo — 166.

Brazilo	166
Germanio	152
Francio	115
Usono	90
Japanio	85
Italio	61
Hungario	53
Nederlando	44
Finnlando	41
Ĉinio	40

Ruslando kun 35 delegitoj okupas la 14an lokon, sed sur la teritorio de Sovetunio nun estas 102 delegitoj en 11 landoj (Ukrainio 19, Estonio 14, Latvio 11, Litovio 9, Armenio 4, Kazahŝtano 4, Taĝikistano 2, Uzbekistano 2, Bjelorusio 1, Kartvelio 1; mankas delegitoj en Azerbajĝano, Kirgizstano, Moldovio, Turkmenistano).

Brazilo estas ankaŭ plej bone reprezentita en la urbolisto, ĉe kies pinto tamen estas la ĉefurbo de Hungario:

Budapeŝto (Hungario)	17
Rio-de-Ĵaneiro (Brazilo) . . .	14
Havano (Kubo)	13
San-Paŭlo (Brazilo)	13
Teherano (Irano)	13
Tokio (Japanio)	12
Zagrebo (Kroatio)	12
Braziljo (Brazilo)	11
Moskvo* (Ruslando)	11
Katmanduo (Nepalo)	10

Neniu “okcidenta” lando estas en la listo, kvankam plej multaj urboj kun delegitoj estas en Germanio (95), Francio (84) kaj Usono (75) — evidente en la okcidentaj landoj oni kredas, ke unu aŭ du delegitoj sufiĉas por unu urbo, dum en la orient-eŭropaj, latinamerikaj kaj aziaj landoj regas pli kolektivisma sinteno.

GK UEA / AIKo


* Inkluzive de Mytiŝĉi, Odincovo (2), Zelenograd.

Por la maja krucvortenigmo venis 18 respondoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Andrej Kirienko (Bjelorusio), Edmund Grimley Evans (Britio), Erkki Kempainen, Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Pere Palà (Hispanio), Hans-Burkhard Dietterle, Nora Caragea (Germanio), Ester Olsen (Norvegio), Marianna Boharewicz, Dorota Burchardt, Mirosława Kubicka, Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Ivars Barševskij, Bronislav Ćupin, Svetlana Konjašova (Ruslando), Roland Larsson (Svedio). La ĝusta respondo: *Tra la mondo*. Ĉapelitaj leteroj mankas. La loto donis premion al **Zbigniew Tylkowski**.

La junia tasko *Trovanto* instigis al kaprompado malpli multajn. Nur kvar sendis siajn provojn. Kvankam neniu sukcesis komplete trovi la intencitan *Lama avo naĝis. Mento, ajlo, cepo forte odoras*, ne mankis interesaj solvoj. La libro-premion ricevas **Klara Ilutoviĉ** (Ruslando), kiu estis la plej proksima al la solvo.

Ni gratulas ambaŭ gajnintojn!

Sesangula krucvortenigmo



Horizontale: 1. Nokta rabobirdo. 2. Ukraina danco. 3. Gvidanto de iuj indianaj triboj. 5. Plena malo al paradizo. 6. Ludo en kazino. 7. Tubo-forma longa trairejo. 8. =Siringo. 10. Japana imperiestro. 11. Demon. 12. Kemia substanco AgNO₃. 13. Sezono. 14. Inerta gaso. 16. =Fringelo. 17. Negacio, neado. 18. Meblo. 19. Metallo. 21. Kemia elemento Ir. 22. Fantomo en islama religio. 23. Konstruaĵo, en kiu oni prezentas spektaklojn.

Suben maldekstren: 1. Proksima parenco en biologio. 2. Populara 6-korda muzikilo. 3. Lernanto en oficirlernejo. 4. Granda ŝarĝ-besto de dezerto. 5. =Iliaka ostro. 6. Plata pilko-jetilo kun interplektitaj ŝnuroj. 7. Pli-malpli dika amaso vaste etendita. 8. Duon-simio. 9. =Astako. 11. Floro. 12. Flava kupro. 13. Ŝildo. 14. =Gazono. 15. =Opuntio. 17. Alkala metalo. 18. =Akropolo. 19. =Navedo. 20. Besteto, tute simila al kuniklo.

Suben dekstren: 1. Kristaleca blanka dolĉa substanco. 2. Perioda eldonado. 3. Nefacetita altpreza ŝtono. 4. Arbo. 5. Insekto. 6. Akcesoraĵo por boato, kanoto, aŭ kanuo. 7. Fiŝo. 8. Duonsimio. 9. Natura kreskaĵo, el kiu oni produktas ŝtofojn. 10. Batala agado por solvi la grandajn ekonomikajn konfliktojn inter la nacioj aŭ la klasoj. 11. Fakultatestro. 12. =Lego. 13. Afrika ŝtato apud la Ruĝa maro. 14. Establita ordo. 16. Intervalo de iu noto al la tria. 17. Kemia elemento Nb. 18. La unua parolado. 19. Akva plantaĵo kun flavaj floroj.

Ĉiuj vortoj estas senfinaĵaj.

Kiom da literoj "Z" estas en la krucenigmo?

Vian solvon sendu al la redakcio rete aŭ poŝte tiel, ke ĝi alvenu antaŭ la 15a de oktobro.

Kompilis **Viktor Alikin**

SPRITAJ SPLITOJ KAJ PRESKERAROJ el la kolekto de reduktoro

Civito provizore ne ekzekutas

La Esperanta Civito aliĝis al la kampanjo ĉe UN por ĝenerala moratorio pri mortpuno. (HeKo 333 1-C, 26 jun 2007; rimarkis Kalle Kniivilä)

Putora deklaro en Italio

Itala Esperanto-Federacio <...> tre fure anoncas, ke ĝi estos reprezentata per la prezidanto mem de la asocio. (Renato Corsetti, 4 jul 2007, <http://groups.yahoo.com/group/landa-agado/message/11334>)

La vivo estas karuselo...

La ofica rotacio startos je la 15a de julio. (HeKo, 332 8-B, 24 jun 2007)

Ŝvela membraro en Nederlando

ESPERANTO - NEDERLAND - ESTRARO: Ans J. Bakker-ten Hagen (2008) prezidanto... vankas (2007) membro. (FEN-X, 2007, №4, p. 11; laŭ <http://www.nettie.fi/droespo/skorpo.htm> vanki = onani; rimarkis Ionel Oneț)

Ardu la nova estraro!

La estraro seksu la evoluon kiu okazas en la informa kampo... (raporto de Jukka Pietiläinen el la subkomitato pri informado, kunsido 5 aŭg 2007 en Jokohamo)

Apostolo el Japanio

La vivo kaj agoj de Miyoshi Etsuo, prezidanto de Swany Korporacio (subtitolo de *Per aktiveco Ĉielen, arda pri idealoj*, aŭtobiografia broŝuro, Kagaŭa-Ken, 2003)

Fojon post fojo, la celo en gloro

... oni povas tre facile (eble 10-20 foje) lerni E-on kompare al eksterlandan nacian lingvon... (Luis I. Raudón Uribe, 26 jul 2007, <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/3371>)

Plukis **István Ertl**

Ridu kun poloj

— Karulo, nia servistino diras, ke ŝi gravediĝis.
— Ŝi mensogas. Neniu kuracisto povas konstati ĉi tion post tri tagoj.

— Kiel estas en via laborejo?
— Samkiel en la paradizo. Ĉiumomente mi povas esti forĵetita.

— Kelnero, kiumaniere vi preparas kokino?
— Simple. Ni diras al ĝi, ke venas tempo por morti.

— Policisto, oni forŝtelis mian manhorloĝon!
— Estas la dua kaj duono.

— Kiel vi dormas? — kuracisto demandas pacienton.
— En piĝamo, sen ŝuoj, en mallumo.

— Direktoro, via edzino petas vin al telefono.
— Ŝi petas? Tio ne eblas.

Virinoj havas diversajn idealojn de viroj. Iuj deziras miliardulojn, aliaj estas kontentaj pro ordinara milionuloj.

Tradukis esperantistoj el Olsztyn (Pollando)

Leterkesto

Mi ricevis antaŭ unu-du semajnoj la julian kajeron. Intere, kiel ĉiam. Fine mi surprizite legis en la recenzo de *Ada, Aduška* fare de Anatolo Sidorov: "Mi opinias, ke la plej bona memorago estus abonado al *Heroldo de Esperanto* redaktata de Ada dum 35 jaroj". Povas esti, ke s-ro Fighiera ne tute dividas tiun ĉi konkludon, kaj mi ekhavis dubon, ĉu eventuale la recenzinto pri tio ne konscias...

Marc Bavant (Francio)

Ŝokis min la lasta alineo de la recenzo de Anatolo Sidorov sur pĝ. 19 de la julia numero de *La Ondo*. Ĉar ne plu eblas aboni la *Heroldon* redaktatan de Ada Fighiera-Sikorska, la plej bona ago memore al ŝi estas ne aboni, ne plu aboni aŭ simple malaboni la nunan pamfletan kaj uzurpan *Heroldon* eldonatan de la silfera kliko, kiu plene perfidas la ideojn kaj spiriton de la esperanta vivo de Ada.

Jorge Camacho (Hispanujo)

Kvar senpagaj libroj por bibliotekoj de esperanto-societoj:

Oraj reguloj por la vivo ĉiutaga

La joko de nutrado

Espero por la mondo: spirita galvanoplastiko

Sub la regno de la kolombo: paco regu

Se via esperanto-societo ne posedas ĉi tiujn librojn, petu la mankantajn titolojn ĉe *Eldonejo Prosveta*:

CH-1808 Les Monts-de-Corsier, Svislando,
kaj vi ricevos ilin senpage.

Temas pri plibonigo de nia vivo dum rilatoj,
nutrado, ktp. Aŭtoro: O. M. Aĭvanhov.
Esperantigo de Claude Piron.

Feliĉu, eblas!

Kiu ankoraŭ ne ricevis tiun senpagan broŝuron, tiu petu ĝin ĉe *Eldonejo Prosveta*:

CH-1808 Les Monts-de-Corsier, Svislando. Aŭtoro:
O. M. Aĭvanhov. Esperantigo de Claude Piron.

Por detalaj klarigoj vidu

http://www.prosveta.ch/izvor91_eo.html

Oceania Kongreso en Nov-Zelando 14-23 januaro 2008

Oceania Kongreso okazos en Auckland,
la plej granda urbo de Nov-Zelando
Trankvila kongresejo inter la urbocentro
kaj internacia flughaveno

*Kongresa programo plena je ekskursoj, debatoj,
distraĵoj kaj kursoj kun internaciaj instruistoj:*

Stano Marček, redaktoro de Esperanto

Trevor kaj Katja Steele (Aŭstralio)

Kongresa kotizo ekde nur 425 eŭroj por 9-taga
kongreso: surloka loĝado, ĉiuj manĝoj, partopreno
en kongreso kaj kursoj

Por pliaj informoj: www.esperanto.org.nz

***Ni bonvenigas samideanojn el la tuta mondo
al nia varm-somera kongreso***

Bonan apetiton, Esperanto!



Salato el la Esperanto-urbo (pĝ. 13)



NASKa regalo (pĝ. 16)



Torto el Pelplin (LOdE-153, pĝ. 9)



Kuko el Ŝiauliai (LOdE-151, pĝ. 10)



Post naŭ sukcesaj konkursoj (1998–2006) la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la deka Internacia Fotokonkurso. Rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La fotoj devos atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1a de decembro 2007.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2008.
2. 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2008.
3. abono de *La Ondo de Esperanto* en 2008.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto*) por la plej bona foto pri la temo *Festoj*.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en *La Ondo de Esperanto*. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31a de decembro 2009 ekskluzivan rajton uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-rajton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

Pro la supra foto Olga Ŝipovalenko ricevis la duan premion en la 9a fotokonkurso